

# EL POPOLO CINIO



中國報道


9  
1978




# Agrikultura meĥanizado de Jantaj

Malgranda hidroelek-  
trejo ĉe Menloŭ-  
akvokonservejo de  
Fuŝan





Fluida amonio produktita de la Kemisterka Fabriko de Mohian-gubernio estas transportata al kamparo.



Disvolvante la spiriton de sinapogo sur propraj fortoj la subprovinco Jantaj de Ŝandong-provinco konstruis malgrandan feran kaj ŝtalan kombinumon, utiligante siajn riĉfontojn, por akceli agrikulturan mehanizon. Nun, tiu subprovinco povas produkti ĉiujare 8,000 traktoretojn kaj diversajn agrikulturilojn. Multaj produktaj brigadoj jam efektivigis mehanizon de plugado, semado, irigaciado, drenado, prilaborado de furaĝo ktp. Krome, ĝi ankaŭ konstruis multajn malgrandajn elektrejojn, kemisterkajn fabrikojn kaj ŝipfarejojn.


Dank' al rapida mehanizado, ĝia hektara produkto-kvanto de greno jam superis 6 tunojn.

Malgranda altforno de la fer-fandejo de Muping-gubernio en produktado



Laborpaūzo surkampe





Traktoroj produktitaj  
de Lajjang



Draŝejo de Siliang-komunumo de Huanghian-gubernio



600-ĉevalpova fiŝkaptista ŝipo fabrikita de Ĵongĉeng-gubernio iras al fiŝkaptado.

# Salaj lagoj de Kinghaj



Transportado de produktajo de la  
Ĉaka-a Salkampo al aliaj lokoj

En Kinghaj-provinco sur la Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo de Ĉinio troviĝas multaj lagoj, el kiuj nemalmultaj estas salaj. Tiuj lagoj produktas grandan kvanton da salo uzata por popola vivo kaj industrio, kaj ankaŭ multajn neorganikajn salojn kiel kalion, boron, lition k.a. Post la Liberigo, la Kinghaja Instituto pri Salaj Lagoj faris al tiuj salaj lagoj ekspluatadon kaj utiligon.




Natura kristalo el sala lago


Membroj de la Kinghaj-a Instituto pri Salaj Lagoj faras mezuradon al la sala lago en Cajdam-baseno.



Observado al sala specimeno



# Termoelektrajo de Hjuĝoŭ en konstruado



Por plene utiligi sian karbon riĉfonton, Hjuĝoŭ konstruas grandan modernan termoelektrajn. La unua periodo de la konstruado por instali du 125,000-kilovattajn vaporturbinajn generatorojn de interne farita duobla akva malvarmigo, produktitajn de nia lando mem, jam finiĝis kaj la maŝinoj ekfunkciis oficiale en de-

sembro de la lasta jaro. Nuntempe iras la dua periodo de la konstruado. La tuta elektrajo kun kapacito de 1,150,000 kilovattoj povos liveri elektron ne nur al la regionoj Hjuĝoŭ kaj Hajĝoŭ, Huajbej kaj Huajjin, sed ankaŭ al suda Giangsu kaj Ŝanhajo, por plenumi la bezonon de la disvolvo de agrikulturo kaj industrio kaj la popola vivo.


Veldado




Transportado de la akvo-malvarmiga muro








La termoelektrajo de Hjuĝou en konstruado



Elektraj turoj



Altensiaj elektrofa-  
denoj en instalado



Instalado de vaporeturbinu

# EL POPOLA ĈINIO

中國新道

1978

N-ro 9

(240)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

## KOVRILO:

P. 1. Sun Vukong en  
pupteatraĵo

P. 4. Birdo

## KOREKTO POR N-RO 8

P. 47, dekstra kolono, 8-a linio,  
"Stelo super Ĉinio" estu legata  
"loko, sed forlasanta ĝin."



## Enhavo

La pupteatra arto de Ĉinio . . . . .	2
"Ribelo kontraŭ la Ĉiela Palaco" (mita pupteatraĵo) . . . . .	5
Vizito al la Ĉina Pupteatra Trupo . . . . .	13
Vizito al la ŝipo "Hanĉuan" . . . . .	15
Ĉiuj strebas antaŭen . . . . .	18
ESP-NOVAĴOJ . . . . .	21
Pro la komisio de Ĉefministro Ĝou . . . . .	22
Korekto de venĝa miskondamno . . . . .	24
Frumateno de Pekino . . . . .	27
Vojaĝo al kvin okcidenteŭropaj landoj . . . . .	29
Pri ekstera komerco de Ĉinio . . . . .	33
AMIKECO: Edgar Snow — fidela amiko de la ĉina popolo (Daŭrigo) . . . . .	35
KURANTAJ AFEROJ . . . . .	39
Kanto de la juneco (romano) . . . . .	41
EN PEKINO: La Somera Palaco . . . . .	44
EL ĈINA MODERNA HISTORIO: Sun Jatsen kaj Tong Meng Huj . . . . .	47
KALEJDOSKOPO: Lajjang-piro . . . . .	50
Akrobataĵo prezentata de pando . . . . .	51
KURANTAJ AFEROJ . . . . .	52

# La pupteatra arto de Ĉinio

**L**A pupteatra arto de Ĉinio jam havas historion de pli ol 2,000 jaroj. Ĝi jam fariĝis popola arto kun aparta stilo, ŝatata de la vastaj amasoj.

Frue en Han-dinastio (206 a. K.-220 p. K.), jam aperis pupteatraĵo en formo rudimenta. En Vej-regno (220-265 p. K.) de la Periodo de la Tri Regnoj (220-280 p. K.) ekprosperis la arto de pupoj delikate faritaj kaj lerte funkciigataj per flua akvo. Tiam la pupoj povis prezenti ne nur kantojn kaj dancojn, sed ankaŭ glavojetadon, tamburadon, staradon sur la kapo kaj similajn akrobataĵojn. En la periodo de la Norda Ki (550-577 p. K.) de la Sudaj kaj Nordaj Dinastioj (420-589 p. K.) aperis la danca farso "Kanto de Sinjoro Guo". La nomita teatraĵo estis verkita laŭ veraj aferoj de veraj homoj. Sinjoro Guo estis komikulo, kies humura kaj mokema prezentado tre plaĉis al spektantoj. Tiu verko metis la bazon por la posta modlado de figuroj kaj prezentado de rakontoj per pupteatra formo.

En Tang-dinastio (618-907 p. K.), la pupteatra arto disvolviĝis pliapaŝe kaj aperis surstangaj pupoj ludataj en akompano de muziko. Dum prezentado, ludanto tenis la pupon sur stango movante ĝiajn kapon, korpon kaj manojn per tri bastonetoj. Kun la disvolviĝo de kulturo kaj arto de Tang-dinastio oni ofte prenis pentraĵojn, skulptaĵojn, muzikaĵojn, dancojn kaj historiajn eventojn kiel enhavon de tiamaj pupteatraĵoj. Ekz., la rakonto vaste cirkulata inter la popolo pri la sagaca batalado inter Liu Bang, imperiestro de Han-dinastio kaj Hiang Ju, reĝo de Ĉu-regno dum la festeno ĉe Hongmen. Tiam, ankaŭ la arto de "fadenaj pupoj" (t.e. marionetoj) disvolviĝis. Dum la prezentado, ludanto per sia dekstra mano tenis tabulon, sur kiu estis fadenoj, kaj per sia maldekstra mano tiris la fadenojn ligantajn la kapon, manojn, brakojn kaj krurojn de pupo por ilin movi. Tiam, oni verkis jenan versaĵon pri tio:

*Fadentirata ligna maljunulo  
kun versimilaj haŭt' kaj blankaj haroj  
rerigidiĝas post prezent' de danco,  
kvazaŭ en song' de l' vivo de l' homaro.*

Tio montris, ke la tiama arto pupteatra jam atingis tre altan nivelon.

Tre prosperis pupteatraĵoj en Song-dinastio (960-1279 p. K.). Tiam estis ne nur multaj specoj de ili, sed ankaŭ relative vasta estis ilia enhavo. Krom la surstangaj kaj fadenaj pupoj, troviĝis ankaŭ gantpupoj movataj per tri fingroj, homopupoj (veraj homoj ludantaj kiel pupoj) akvomovataj pupoj, pulvomovataj pupoj ktp. La enhavo de la pupteatraĵoj estis ofte transprenitaj el mitoj, fabloj, historiaj verkoj, operoj, popolrakontoj ktp., kaj jam troviĝis libretoj de pupteatraĵoj. La nivelo de luda lerteco estis sufiĉe alta. Historia literaturo jene notis: "La fadenaj pupoj estas versimilaj kaj la lerteco de prezentado de surstangaj pupoj estas mirinda." En ĝi troviĝis ankaŭ jenaj komentoj: La luda tekniko estas "vere mirinda". Tiam jam aperis speciala muziko por pupteatraĵoj. Oni povas diri, ke la tiama pupteatro jam fariĝis sinteza arto. Se la "Kanto de Sinjoro Guo" de Norda Ki kreis la vojon por la ĉina pupteatra arto, en Song-dinastio plenumiĝis do la sintezado de tiu arto.

En la dinastioj Juan (1279-1368 p. K.), Ming (1368-1644 p. K.) kaj King (1644-1911 p. K.), la ĉefa karakterizaĵo de la pupteatra arto en sia disvolviĝo estis tio, ke ĝi intime rilatiĝis kun diversaj lokaj operoj. Antaŭ ĉio, la pupteatraĵo nutris per si la lokajn teatraĵojn kaj kreis favorajn kondiĉojn por ilia formiĝo. En la Pekina Opero, la aktoroj eliras el la scenejo dekstre kaj eniras ĝin maldekstre, imite al la pupteatraĵoj. Kaj poste, la prospera disvolviĝo de la lokaj teatraĵoj antaŭenpuŝis la reformon de la pupteatraĵoj. Multaj lokaj operoj estis transplantitaj

kun siaj prezentado, muziko kaj kantoj en pup-  
teatraĵojn. Tamen, en multaj flankoj la puptea-  
traĵoj superis la lokajn operojn, ekz., la plastiko  
de la pupo povas esti multe pli troiga kaj iliaj  
movoj pli netaj. La pupoj povas jen flugi ĉielen  
jen eniri teren, jen haki per tranĉilo, jen ludi gla-  
von, jen fari magion, laŭ postulo de la intrigo  
de la teatraĵo. La pupteatra arto de nia lando  
karakteriziĝas per multa apliko de kantoj kaj  
dancoj, lirikisma stilo kaj intensa vivetoso. La  
formo taŭgas por prezenti ne nur intensan bata-  
lon, sed ankaŭ kvietajn scenojn, ne nur kome-  
diojn sed ankaŭ tragediojn. Oni povas esprimi  
sentojn de homoj per precizaj movoj. Krome, la  
lingvo uzata en la teatraĵoj estas ritma. Tamen,  
en la pasinteco la feŭdaj regantoj de Ĉinio ne-  
niam rigardis ilin kiel veran arton. Precipe, la  
prosperiĝo de la opera arto de Juan-dinastio  
obstrukcis la disvolviĝon de la pupteatra arto  
kaj pereigis plurajn specojn de pupteatraĵoj.

La pupteatra arto de Ĉinio komencis sian veran  
grandan disvolviĝon kaj reformon nur en la  
kvindekaj jaroj post la Liberiĝo. Kun disvolviĝo  
de la socialismaj literaturo kaj arto, granda  
numero da artistoj ekokupis sin pri pupteatra  
arto. Laŭ nekompleta statistiko, tiam la tuta



*Marionetoj*



*Gantpupoj*

Ĉinio jam havis pli ol 11,000 pupludistojn. Sub la direktado de la principo elmetita de Prezidanto Maŭ “floru cent floroj, elŝovu novon el malnovo”, “utiligi la antikvajn en servo al la nuntempo, utiligi la fremdlandajn en servo al Ĉinio”, la artistoj kreis novan sintezan tipon de pupteatraĵoj post praktikado. Oni renovigis iujn pupteatraĵojn sur la bazo de operoj, kaj rompintis al aliaj la malnovajn rutinajn limigojn kaj provis apliki al ili la formon de filmo, opero kaj teatraĵo. La mito-teatraĵo “Ribelo kontraŭ la Ĉiela Palaco” prezentata de la Ĉina Pupteatra Trupo altgrade montris tiun novan atingon de la pupteatra arto en la lastaj jaroj.

La pupteatraĵo “Ribelo kontraŭ la Ĉiela Palaco” kunfandis la prezent-formojn de ĉiuj aliaj specoj de pupoj kun tiu de surstangaj pupoj. Ekz., Sun Vukong estas ludata per surstangaj kaj kaŭĉukaj pupoj, tamen multaj malgrandaj simioj per gantpupoj. Oni uzas ankaŭ la teknikon de la fadena pupo. La surstangaj pupoj sin

*Surstangaj pupoj*



dividas en tri specojn, nome la grandan, mezgrandan kaj malgrandan. Ekz., la Giganto (generalo de ĉielaj trupoj) estas ludata per granda surstanga pupo kiu altas kiel vera homo, kaj la Loka Dio (dio de malalta rango) per malgranda. Je la fina alta tajdo de la teatraĵo vera homo sursceniĝas en la rolo de Sun Vukong kaj ludas kune kun la pupoj. Sun Vukong lerte svingas la magian bastonon, facile kaptas la ĉielajn generalojn kaj soldatojn kaj forjetas ilin malsupren de la scenejo, montrante la grandan forton de la homigita simio. Tiuj prezentaj manieroj multe vigligas la scenejon kaj intensigas la etoson de mito.

Due, la “Ribelo kontraŭ la Ĉiela Palaco” elvolvis la apartajn imagipovon kaj esprimivon de la pupteatro. Ekz., kiam la Nudpieda Feo en la teatraĵo ekzaltiĝas de ĝojo, ĝia kapo eĉ povas sin turni unu-rivolue; kaj kiam Sun Vukong trompe foririgis la Nudpiedan Feon, ĝi tuj sin ŝanĝis en la saman Nudpiedan Feon, kaj duono de ĝia kapo prezentas la vizaĝon de la Nudpieda Feo kaj la alia tiun de Sun Vukong. Dum prezentado, jen vidiĝas tiu, jen la alia duono, donante dezirindan efikon. La unueco de la enhavo kaj esprimformo kreita de la verkinto kaj reĝisoro disvolvis la superecon de la pupteatra arto kaj manifestis tute novan stilon.

Krome, oni aplikis al la teatraĵo diversajn rimedojn de la teatro inkluzive de modernaj dekoracioj kaj lumigado. En prezentado ĝi tute rompis la rutinan kadron, precipe la pupoj estis tre zorge faritaj en mita stilo kaj riĉaj je personaj trajtoj. La figuro kaj koloroj de la kaŭĉukaj pupoj estas aparte interesaj kaj krome iliaj brovoj kaj buŝo povas esprimriĉe moviĝi.

Unuvorte, la hodiaŭa pupteatra arto de Ĉinio influas kaj akcelas unu alian kun la aliaj branĉoj de la moderna teatra arto. Nun, por pli bone servigi tiun antikvan artan formon al la popolo, precipe por kontentigi la artan ĝuon de geknaboj, la ĉinaj pupteatraj laborantoj klopodas por krei novon. Samtempe kun senĉesa resumado de la sperto de la ĉina pupteatra arto, ili pene lernas de la atingoj de fremdlanda pupteatra arto por plialtigi sian artan nivelon.

KIAN SIMING:

# Ribelo kontraŭ la Ĉiela Palaco

(Mita pup teatraĵo)

*“Ribelo kontraŭ la Ĉiela Palaco” estas pup teatraĵo, kiun la Ĉina Pupteatra Trupo ludos en la Internacia Pupteatra Festivalo, kiu prenos lokon en la komenco de oktobro en Jugoslavio.*

*La nomita mita teatraĵo estas adaptaĵo de la unuaj 7 ĉapitroj de la ĉina klasika romano “Pilgrimado al la Okcidento”. La heroo Sun Vukong estis simio-reĝo loĝanta en la Monto de Floroj kaj Fruktoj. Li akiris magian bastonon, kiu estis al li kvazaŭ aldonitaj flugiloj al tigro. Informiĝinte pri tio, la Ĉiela Imperiestro, kiu pretendis pri superreganteco super ĉio, trompe venigis lin al la ĉielo, por ke li prizorgu liajn ĉevalojn. Trovinte sin trompita, Vukong ribelis kontraŭ la Ĉiela Palaco. Post reveno al sia Monto de Floroj kaj Fruktoj li sin nomis “Ĉielegala Sanktulo”. Ne povante tion toleri, la Ĉiela Imperiestro denove venigis Vukong al la ĉielo per artifiko, por ke li gardu la Persikan Ĝardenon. Ofendite de tiu artifiko, li malordigis la Persikan Festenon kaj fariĝis ankoraŭ pli potenca post formanĝo de ĉielaj persikoj kaj piloloj speciale faritaj por la Ĉiela Imperiestro. Pro tio, la Ĉiela Imperiestro ekspedis ĉielajn trupojn por subpremi la ribelulojn. Sed ili estis plene venkitaj de Vukong, kaj tiu ĉi detruis la Ĉielan Palacon kaj vivis libere kaj feliĉe sur la Monto de Floroj kaj Fruktoj, kun sia gento.*

LA RED.

## Personoj

Sun Vukong, reĝo de simioj  
Monstro-Bovo  
Ĉefsimio  
Simio-Kuriero  
Simioj  
Ora Stelo, feo  
Nudpieda Feo  
Laŭgjun, feo kultita de taoistoj kiel fondinto de  
ilia religio  
Ĉiela Generalo Li, komandanto de ĉielaj trupoj  
Erlang, generalo de ĉielaj trupoj  
Nuoga, generalo de ĉielaj trupoj  
Giganto, generalo de ĉielaj trupoj  
Loka Dio, dio de malalta rango  
Feinoj A, B, C, D  
Feo-kurieroj A, B  
Feo-knaboj A, B  
Ĉiela Hundo  
Ĉielaj generaloj

### Sceno I Riproĉo al la Ĉiela Imperiestro

*(Kiam leviĝas la kurteno, pluraj simioj ludas antaŭ la Monto de Floroj kaj Fruktoj. Aŭdiĝas kanto post la kuliso.)*

*(Envenas kvar simioj kaj Sun Vukong, kiun sekvas la Ĉefsimio tenante baldakenon. Ĉiuj kantas kaj dancas.)*

*(Ĥoro):*

*En la montar' smeralda ĉie pompas ĉarmaj  
floroj,  
kurtensimila akvofal' rebrilas de l' koloroj  
de l' nuboj. En hejmloko tiel bela ni  
vivadas,*

*plenplenaj de feliĉ' kaj ĝojo estas niaj koroj.*

*(Envenas simio-soldato.)*

**Simio-soldato:** Via ekscelenco, alvenas lia ekscelenco, Monstro-Bovo.

**Vukong:** Petu lin enveni!

*(Envenas Monstro-Bovo. Li kaj Vukong salutas unu la alian kaj sidiĝas.)*

**Monstro-Bovo:** Mi aŭdis, ke vi estis invitita al la Ĉiela Palaco. Kial vi tamen tuj revenis?

**Vukong:** Pri tio ankoraŭ flamas mia indigno.

**Monstro-Bovo:** Nu?

**Vukong:** Frato, ĉu vi scias, por kio la oldulo Ĉiela Imperiestro min invitis al la ĉielo?

**Monstro-Bovo:** Ĉu ne dece gastigi vin?

**Vukong:** He! *(ekstaras frapante la tablon)* Li trompis min, ke mi oficu kiel lia ĉevalbredisto!

**Monstro-Bovo:** Absurdaĵo!

**Vukong:** Tio ne estas ĉio! Li ordonis eĉ la Intendanton de Imperiestraj Ĉevaloj ofende minsupervidi. Sed, responde mi jam detruis la ĉevalbredejon kaj ribelis kontraŭ la Ĉiela Kortego.

**Monstro-Bovo:** Brave!

**Vukong:** Brave?

**Monstro-Bovo:** Brave!

**Vukong:** Ah?

**Monstro-Bovo:** Ah — ha-ha-ha-ha! Kial kun via senkompara kapablo vi devus toleri ofendon de la Imperiestro?

**Ĉefsimio:** La Imperiestro estas nenio por nia ĉefo.

**Monstro-Bovo:** Mi proponas, ke via ekscelenco alprenu la titolon "Ĉielegala Sanktulo" por rivali kontraŭ la Imperiestro!

**La simioj:** Jes! Vi estu "Ĉielegala Sanktulo", kaj samrangu vin al la Imperiestro!

**Vukong:** Bone! Do mi alprenu la titolon, sed sciigu tion al la oldulo Imperiestro por lin embarasi!

**Monstro-Bovo:** Ha-ha-ha!

**Simio A:** Mi sciigu lin.

**Vukong:** Bone! *(Li prenas bastoneton el la orelo, kaj tiu tuj grandiĝas kaj la simio surgrimpas ĝian pinton.)* Kresku! Kresku! *(La*



*bastono tiel grandiĝas, ke ĝi penetras en la Ĉielon.)*

**Simio A** (*en nuboj*): Hej! Aŭskultu Ĉiela Imperiestro! Nia ĉefo fariĝis “Ĉielegala Sanktulo”! (*Li malsupreniĝas kun malkresko de la bastonego.*) Via ekscelenco, la gardanta generalo ĉe la Suda Ĉiela Pordego kun konfuziĝo kuris por raporti al la Imperiestro!

**Vukong**: Bone. Malgrandiĝu! (*Li kaŝas la malgrandiĝintan bastonon en la orelon.*)

**Monstro-Bovo**: Vere mirinda estas via bastono!

**Ĉefsimio**: Ekdancu knaboj por celebri la alprenon de la nova titolo!

**Vukong**: Ne! Ne dancu, prefere faru militan ekzercon! Kiam la oldulo ricevos la informon, li ne lasos nin kvietaj. Ni devas nin prepari kontraŭ lia atako!

**Ĉefsimio**: Jes! Ekzercu vin!

*(La simioj komencas militan ekzercadon.)*

*(Envenas simio-soldato.)*

**Simio-soldato**: Via ekscelenco, alvenas denove la Ora Stelo!

**Vukong**: Knaboj!

**Ĉiuj**: Jes!

**Vukong**: Kruciĝu la glavoj kaj lasu lin enveni kapkline sub la armiloj!

**Ĉiuj**: Jes!

*(Envenas la Ora Stelo.)*

**Simio-soldato**: Ora Stelo, nia ĉefo ordonis, ke vi eniru sub la glavoj mem anoncante vin!

**Ora Stelo**: Jes, jes! Ora Stelo petas anonci sin!

*(Timtremante la Ora Stelo eniras sub la glavoj.)*

**Ora Stelo**: Saluton, via ekscelenco!

**Vukong**: Por kio vi venas denove?

**Ora Stelo**: La Ĉiela Imperiestro informiĝis, ke vi alprenis la titolon de “Ĉielegala Sanktulo” kaj speciale sendis min por gratuli vin.

**Vukong** (*malestime*): Hm!

**Ora Stelo**: Sed dioj sur la ĉielo sentas, ke la titolo estas iom ofenda.

**Vukong** (*ekfrapas la tablon*): Ofenda? Ĉu mi tolerus ofendojn de la oldulo Imperiestro?

**Ora Stelo** (*minace*): Ho, tamen la ministroj kaj generaloj ne povas toleri kaj volas ataki vian monton!

**Vukong**: Jen rigardu!

*(La simioj staras en imponaj batalvicoj.)*

**Vukong**: Ĉe ni estas ekzercitaj trupoj kaj sufiĉa provizaĵo. Viaj ĉielaj trupoj venu kaj mortu, se ili volas.

**Ora Stelo**: Ho ne, ho ne. Lia majesto estas bonkora al vi kaj ne volas militon, tial li oficiale nomis vin Ĉielegala Sanktulo. Jen akceptu lian dekreton! (*Li montras la dekreton.*)

**Vukong**: Ba!

**Monstro-Bovo**: Lia ekscelenco jam estas Ĉielegala Sanktulo, por kio necesas lia nomado!

**Ĉefsimio** (*kaptas kaj forĵetas la dekreton*): For!

**Ora Stelo**: Ne koleru, via ekscelenco. La Ĉiela Imperiestro ordonis min refoje inviti vin al la Ĉiela Palaco.

**Vukong**: Por denove bredi ĉevalojn por la oldulo?

**Ora Stelo**: Ho ne. La Imperiestro jam ordonis konstrui por vi palacon de Ĉielegala Sanktulo. Kaj nun la Persika Ĝardeno estos sub via administrado. La ĝardeno kun aromaj fruktoj ja estas bela loko! Loĝi surtere ja ne konvenas por via ekscelenco, kiu posedas tiel grandan kapablon. Krome vi nun estas Ĉielegala Sanktulo.

**Vukong**: Ĉu vi provas min denove trompi?

**Ora Stelo**: Ho ne! Miaj vortoj estas tute sinceraj.

**Vukong**: Frato Bovo, mi do vizitos la Ĝardenon. Se la oldulo denove mistraktos min, mi renversos lian tutan regnon.

**Monstro-Bovo**: Iru trankvile, via ekscelenco. Kaj ni ĉi tie ekzercos la trupojn por eventuala bezono.

**Vukong:** Mi iras nun! (*Forflugas.*)

**Ora Stelo:** Ne rapidu, via ekscelenco! (*Eliras sekvante Sun.*)

## Sceno II En la Persika Ĝardeno

(*Kiam leviĝas la kurteno, envenas Ora Stelo kaj Sun Vukong.*)

**Ora Stelo:** Bonvolu, Sanktulo.

**Vukong:** Ĉu ĉi tie estas la Persika Ĝardeno?

**Ora Stelo:** Jes, la Ĉiela Imperiestro titolis vin per Ĉielegala Sanktulo kaj loĝigas vin en la Persika Ĝardeno. De nun multe pli belan vivon vi ĝuos ol sur la tero.

**Vukong:** Vi jam kondukis min ĉi tien. Vi povas nun foriri.

**Ora Stelo:** Mi devas fari aranĝon. Kie estas la Loka Dio? (*Envenas la Loka Dio oscedante kaj frotante la okulojn.*)

**Loka Dio:** Mi, la Loka Dio de la Persika Ĝardeno, salutas vian fean moŝton.

**Ora Stelo:** De nun la Ĝardeno estos administrata de la Ĉielegala Sanktulo. Vi devas lin priservi zorgeme!

**Loka Dio:** Jes.

**Vukong:** Loka Dio, gvidu min por pririgardi la Ĝardenon!

**Ora Stelo (rikanas):** Hm hm. . . (*Li eliras.*)  
(*Leviĝas la dua kurteno kaj vidiĝas la Persika Ĝardeno.*)

**Vukong:** Loka Dio, kiom da persikarboj sin trovas en la ĝardeno?.

**Loka Dio:** En la ĝardeno estas entute 3600 persikarboj, el kiuj la frontaj 1200 fruktas unufoje en 3000 jaroj, la mezaj 1200 fruktas unufoje en 6000 jaroj, kaj la malantaŭaj 1200 fruktas unufoje en 9000 jaroj. Manĝinto de tiaj persikoj povas fariĝi senmorta feo.

**Vukong:** Ho —

**Loka Dio:** Tamen, la persikoj estas destinitaj sole por la Persika Festeno de la Diino. Kaj neniuj rajtas ilin tuŝi.

**Vukong:** Nu, vi povas foriri.

**Loka Dio:** Jes. Ho, Sanktula Moŝto, estu indulga al la persikoj!

**Vukong:** Foriru jam.

(*La Loka Dio eliras.*)

**Vukong:** Nu, mi trarigardu la ĝardenon. (*Li eliras.*)

(*Envenas kvar feinoj kaj kantas:*)

*De la Diin-palac' jen la ĝardenon ni alvenas.  
Je bonodor' persika la tuta ĉielo plenas.  
En la monato tria ĉiuĵare l' tempo belas,  
kaj kun feoj, per persikoj, la Diin' festenas.*

**Feino A:** Loka Dio, Loka Dio . . . Ha, maldiligentulo, li dormadas eĉ en tago!

**Feino B:** Aŭdacas Loka Dio, vi tute forgesis vian devon! Ĉu vi ne timas punon, se perdiĝos persikoj?

**Loka Dio (dormeme):** Nun la ĝardeno estas sub zorgo de la Ĉielegala Sanktulo, kaj per — persikoj ne povas perdiĝi. Ne bruu, kaj mi — mi maljunulo volas ankoraŭ iom dormi.

**Feino C:** Kiu estas la Sanktulo?

**Feino A:** Ni voku lin: Sanktulo!

**Feino B:** Ni jam komencu plukadon, se li ne estas trovebla.

(*La feinoj komencas pluki persikojn.*)

(*Post la kuliso krias Vukong: Hej, kiuj ŝtelas persikojn!*)

(*La feinoj surpriziĝas kaj lasas fali persikon, el kiu saltas Sun Vukong.*)

**Feinoj A B C D:** Kiu vi —

**Vukong:** Sun Vukong, la Ĉielegala Sanktulo!  
Kiu rajtigas vin pluki la persikojn?

**Feino A:** En la tria de la tria monato, la Diino okazigos persikan festenon por regali la feojn kaj diojn. Tial ŝi ordonis nin pluki persikojn.

**Vukong:** Ĉu mi estas inter la invititoj?

**Feino B:** Laŭ mia scio, ne.

**Vukong:** Kio? Ŝi ignoras min, la Ĉielegalan Sanktulon? Kia ofendo! (*pripensas*) Haltu!

Haltu! (*Li sorĉe fiksis la kvar feinojn ĉe la loko.*) Mi unue fiksu ilin ĉi tie, por ke ili ne perfidu min. Nun mi iru al la Persika Festeno! (*Li eliras.*)

*Falas la dua kurteno kaj envenas la Nudpieda Feo.*)

**Nudpieda Feo:**

*Ni, feoj, havas feliĉan sorton:  
ne estas zorgoj sed nur komforto.*

*(Ora Stelo alvenas renkonte.)*

**Ora Stelo:** Saluton, Nudpieda Feo!

**Nudpieda Feo:** Ho, saluton, Maljuna Stelo! Kien vi iras?

**Ora Stelo:** Mi kondukis Sun Vukong al la Persika Ĝardeno, kaj nun mi iras raporti al la kortego.

**Nudpieda Feo:** Ĉu ne temas pri la demona simio sur la tero?

*(Sun Vukong alvenas sur fluganta nuboj, haltas kaj aŭskultas.)*

**Ora Stelo:** Jes, ĝuste li.

**Nudpieda Feo:** Kial honori tiun simion per altranga titolo kaj eĉ venigi lin al la ĉielo?

**Ora Stelo:** Via fea moŝto, tiu simiaĉo estas tre tre potenca kaj faris tumulton en la Draka Palaco kaj en la subtera mondo. Por eviti pliajn tumultojn, la Ĉiela Imperiestro venigis lin al la ĉielo. Malplena titolo estas nur mal-kara kosto por fakte lin supervidi. Ĉi tie li estas sola. Se li malobservos la ĉielan leĝon, li tuj estos punita.

**Nudpieda Feo:** O, bone! Bona ideo!

**Ora Stelo:** Ĝis revido, ĝis!

*(Li eliras.)*

**Vukong:** Mi sufokiĝos de indigno! (*Salte descendas.*)

**Nudpieda Feo (surprizita):** Vi — oh, ĉu vi ne estas la simio ĵus veninta al la ĉielo?

**Vukong:** Kien vi iras?

**Nudpieda Feo:** Mi? Sciu, mi iras al la Persika Festeno de la Diino. Persika Festeno, kredeble vi eĉ neniam aŭdis pri ĝi?

**Vukong:** Kia ofendo! (*Li ekpensas.*) Nu jes. Taoisto, la Ĉiela Imperiestro ordonis, ke ĉiuj invititoj devas unue iri al Tongming-halo por ekzerci sin pri ceremoniaĵoj praktikotaj en la festeno.

**Nudpieda Feo (malestime):** Ĉu vi ankaŭ scias kion signifas “ceremoniaĵoj”? Kiu diris tion al vi?

**Vukong:** Mi ĵus renkontis senditon de la Imperiestro ekster la Suda Pordego.

**Nudpieda Feo:** Ĉu vere?

**Vukong:** Kial mi trompu vin?

**Nudpieda Feo:** Ĉijare plimultiĝas formalajoj, nu, mi do iru al la halo! (*Li levas sian piedon.*) Mi devas fari ĉirkaŭiron! Jen, veziko jam aperis sur la plando.

**Vukong:** Hm, vi mem meritas tion. Kial vi ne portas ŝuojn!

**Nudpieda Feo:** Ĉu mi, Nudpieda Feo, tamen portus ŝuojn? (*Li eliras.*)

**Vukong (en neretenebla kolero):** Ha! La Imperiestro kaj la feoj tiel ofte malestimas min, ĉu mi toleru tion! Mi transformiĝu en Nudpiedan Feon kaj enŝteliĝu en la Diinan Palacon por fari al ili grandan konfuzon! (*Li transformiĝas en Nudpiedan Feon kaj kantas.*)

*Ni, feoj, havas feliĉan sorton:  
ne estas zorgoj sed nur komforto.*

*(Li eliras.)*

### Sceno III Konfuzo en la Festeno

*(Kiam leviĝas la kurteno, la falsa Nudpieda Feo envenas al la festeno en la Diina Palaco.)*

**Fe-kuriero A:** Tiel frue jam alvenas via fea moŝto.

**Vukong:** La Ĉiela Imperiestro ordonis, ke mi kontrolu la preparadon de la festeno.

**Fe-kuriero B:** Ĉio estas jam preta, escepte de la persikoj, kiujn la feinoj iris pluki.

**Vukong:** Mi ĵus preteriris la ĝardenon kaj vidis, ke la feinoj estis en dormado.

**Fe-kuriero A:** Kia misfaro!

**Vukong:** Tuj urĝigu ilin.

**Feo-kuriero B:** Jes. (*Eliras la du feo-kurieroj.*)

**Vukong** (*jetante rigardon al la tabloj*): Ĉiela vino, raraj frandaĵoj el la maro kaj montoj. . . Mi frandu laŭplaĉe! (*Li reprenas sian propran formon kaj ekmanĝegas.*) La superfluaĵojn mi sendu al la Monto de Floroj kaj Fruktoj, por ke ankaŭ miaj knaboj iom gustumu ilin. (*Li tiras de si harojn kaj transformas ilin en sakegon kaj du simiojn, kaj la lastaj forflugas kun la sako plenigita per manĝaĵoj.*)

(*Du feo-knaboj envenas portante pilolojn.*)

**Vukong:** Kio estas tio?

**Feo-knabo A:** Oraĵ piloloj de Laŭgjun por la Diino.

**Vukong:** Por kio tio utilas?

**Feo-knabo B:** Manĝinte tian pilolon oni fariĝos senmorta. (*La knaboj eliras.*)  
(*Vukong komencas engluti pilolojn. Envenas Laŭgjun.*)

**Laŭgjun:** Ah? Ĉi, simiaĉo, eĉ kuraĝas ŝtele manĝi miajn pilolojn.

**Vukong:** En kio tio gravas? Mi jam fortrinkis la vinon. Kion do vi volas de mi?

**Laŭgjun:** Ki-ki-kia aŭdaco!

(*Envenas la du feo-kurieroj.*)

**Feo-kuriero A:** Laŭgjun, la feinoj estas sorĉe fiksitaj en la Persika Ĝardeno!

**Feo-kuriero B:** Ho, kie estas la manĝaĵoj? Kiu estas la simio?

**Laŭgjun:** Tuj kaptu lin!

(*La feo-kurieroj sin jetas al Vukong, sed tiu ĉi saltas post la dorson de Laŭgjun kaj transformiĝas en Laŭgjun. Li turnas Laŭgjun tiel, ke la feo-kurieroj ne plu povas distingi la veran de la falsa.*)

**Feo-kuriero A:** Kiu estas la vera?

**La Laŭgjun-oj:** Mi estas la vera! (*La vera Laŭgjun indigniĝas kaj la feo-kurieroj ne scias kion fari. Envenas la Nudpieda Feo.*)

**Nudpieda Feo:** La simiaĉo trompis min, tiel ke vane mi iris al Tongming-halo! Mi eksplodos de indigno! (*Li rimarkas la du Laŭgjun-ojn.*) Ha, du Laŭgjun-oj!

**Laŭgjun:** Li estas la simiaĉo aliformiĝinta!

**Vukong:** Li estas la simiaĉo aliformiĝinta!

**Feo-kuriero B:** Nudpieda Feo, ĉu vi formanĝis la manĝaĵojn sur la tabloj?

**Nudpieda Feo:** Ĉu mi? Mi ĵus alvenas de la halo!

**Laŭgjun:** La simiaĉo ŝtelmanĝis ilin! Mi vidis tion!

**Vukong:** Ha-ha-ha! (*reprezente sian propran formon*) Mi foriras!  
(*Li eliras ebrie.*)

**Laŭgjun:** Tuj raportu al la Imperiestro por kapti la simion!

**Nudpieda Feo:** Kaptu lin!

(*Falas la dua kurteno. Ĉielaj batalistoj trapasas la scenejon. Envenas la Nudpieda Feo.*)

**Nudpieda Feo:** Sturmu, bravaj batalistoj! Kaptu Sun Vukong por ricevi premion!

(*Envenas venkitaj generaloj.*)

**Nudpieda Feo:** Antaŭen! Antaŭen!

**Generalo:** Terura estas Sun Vukong!

(*Vukong envenas.*)

**Nudpieda Feo:** Ho panjo! Venu tuj, Erlang!  
(*elkuras.*)

(*Vukong batalas kontraŭ la ĉielaj generaloj. Erlang ellasas sian hundon por mordi Vukong. Profitante la okazon, Laŭgjun jetas sian ringon al Vukong kaj katenas lin per ĝi.*)

**Nudpieda Feo** (*ree enveninta*): Morthaku lin!

(*Sed la ĉielaj generaloj ne povas vundi Vukong per hakado.*)

**Nudpieda Feo:** Kion fari?

**Laŭgjun:** Ĵetu lin en mian fornon!

**Ĉiuj:** Bruligu lin en la forno!

**Vukong:** Hm. . . (*Li staras senĝene kun levita kapo.*)

## Sceno IV En la forno

*(En la Palaco de Laŭgjun. Kiam leviĝas la kurteno, feo-knabo incitas fajron en forno per ventumilo kaj Laŭgjun recitas sorĉajn vortojn frapante tintilon apude. Envenas la Nudpieda Feo kaj la Ora Stelo.)*

**Nudpieda Feo:** Kiom da tagoj vi jam bruligis lin?

**Feo-knabo:** Jam 49 tagojn.

**Nudpieda Feo:** Hm, simio, ĉifoje restos de vi eĉ neniu hareto!

**Ora Stelo:** Forbruligu la simiaĉon, la radikon de ĉia malordo!

**Laŭgjun:** Prave! Se nur la simiaĉo restas, en la Ĉiela Kortego ne estos kvieteco!

**Nudpieda Feo:** Laŭgjun, malfermu la fornon kaj ni pririgardu.

**Laŭgjun:** Malfermu la fornon!

*(Apenaŭ finiĝas lia vorto, kiam tondre eksplodas la forno kaj saltas el ĝi nigra simio.)*

**Nudpieda Feo:** Ah?! Li estas . . .

*(La nigra simio forskuas la nigran cindron kaj fariĝas ore disradiana. La Ora Stelo teruriĝas kaj elkuras. Vukong eltiras sian bastonon, fortimigas la feo-knabon kaj batas Laŭgjun kaj la Nudpiedan Feon.)*

*(Ĥoro:)*

*Mil dankojn! Viaj flamoj fajraj  
havigis orpupilojn al mia okulparo,  
min hardis en fortikan ŝtalon.  
Ĉu mi, Sanktulo la Ĉielegala,  
tolerus viajn trompojn kaj insultojn,  
Kaj vin ne punus pro l' ĉikanoj?  
Mia kolera spiro blovos kiel uraganoj,  
falos la Di-palac' sub miaj bastonbatoj!*

**Vukong:** Mi iras ruinigi la palacon de la Ĉiela Imperiestro!

**Nudpieda Feo:** Ribelo! Ribelo!

## Sceno V Batalo

*(Kiam leviĝas la kurteno, Ĉiela Generalo Li*

*staras en nubo kun Erlang ĉe la maldekstra flanko kaj Nuoĝa ĉe la dekstra. Ĉielaj armeanoj staras en vico.)*

**Ĉiela Generalo Li:** La 28 konstelacioj!

**28 konstelacioj:** Jes!

*(Leviĝas nuboj.)*

**Ĉiela Generalo Li!** La Dioj de Suno kaj Luno!

*(Leviĝas nuboj.)*

**La dioj:** Jes!

*(Leviĝas nuboj.)*

**Ĉiela Generalo Li:** La Dioj de la Kvin Montegoj.

**La dioj:** Jes!

*(Leviĝas nuboj.)*

**Ĉiela Generalo Li:** Dio Tondro kaj diino Fulmo!

**Tondro kaj Fulmo:** Jes!

*(Leviĝas nuboj.)*

**Ĉiela Generalo Li:** La simiaĉo Sun Vukong faris malordojn en la subtera mondo kaj la Draka Palaco, detruis la Persikan Festenon, eksplodigis la fornon de Laŭgjun kaj atakis la Sudan Pordegon de la Ĉiela Palaco. La Ĉiela Imperiestro estas skuita kaj ordonis, ke mi defendu la Ĉielan Kortegon per 100,000 ĉielaj batalistoj. Ĉielaj generaloj!

**Amaso:** Jes!

**Ĉiela Generalo Li:** Ataku la malamikojn!

**Amaso:** Jes.

*(Manovrado. Ekstere de la Suda Pordego. Envenas Vukong kun simioj-soldatoj. Komenciĝas batalo. Envenas Nuoĝa.)*

**Vukong:** Jen bubo, ankaŭ vi venas por morti?

**Nuoĝa:** Jen piko!

*(Ili komencas batali. Nuoĝa estas venkita kaj eliras. Envenas la Ĉiela Giganto.)*

**Giganto:** Hej!

**Vukong:** Pro kio kriaĉas ci stultulo?

**Giganto:** Mi estas generalo Ĉiela Giganto!  
*(Ekbatas.)*

*(Vukong ĉikanas lin.)*

**Vukong:** Sentaŭgulo! Sentaŭgulo! Ha-ha-ha. . .

*(Vukong eliras persekutante la Giganton. Envenas Monstro-Bovo kaj la Ĉefsimio kaj ekbatalas kun ĉielaj generaloj. Envenas Erlang kaj venkas simioj-soldatoj. Vukong alvenas renkonte al li. Erlang kaj Vukong interbatalas, transformiĝante por superi unu la alian. Vukong malvenkas kaj eliras.)*

**Erlang:** Kien fuĝi!

*(Li eliras persekutante.)*

*(Vukong envenas.)*

**Vukong:** Mi kaptu lin per artifiko! Mi transformiĝu en templon — la buŝo en pordon, la okuloj en fenestrojn kaj la vosto en flagstango!

*(Vukong transformiĝas en templon. Envenas Erlang kun sia Ĉiela Hundo. La vosto de la hundo estas kaptita kaj rompita de la swingiĝantaj pordoklapoj, kaj la hundo eliras.)*

**Erlang (rigardas):** Jen templo, sed kial la flagstango staras malantaŭe? *(cerbumas)* Ĝi certe estas transformiĝo de la simiaĉo.

*(La flagstango falas sur Erlang, kiu eliras fuĝe.)*

**Vukong:** Knaboj, Ataku!

*(La simioj ekatakas kriante. Svingante sian bastonon, Vukong eliras persekutante. Ĉielaj generaloj envenas fuĝante kaj Ĉiela Generalo Li iras al ili renkonte.)*

**Ĉiela Generalo Li:** Kiel estas?

**Amaso:** Terure venkitaj, ni estas persekutataj.

**Ĉiela Generalo Li:** Mi kaptu lin!

*(Vukong envenas postkurante. Ĉiela Generalo Li ĵetas al li sian pagodon, kiu grandiĝas kaj premfaligas Vukong.)*

**Ĉiela Generalo Li:** Ha-ha-ha-ha!

**Vukong:** Hura! *(Li faligas la pagodon kaj turniĝas en formon de giganta simio.)*

**Amaso:** Ho! — *(forkuras)*

*(La Ora Stelo envenas.)*

**Ora Stelo:** Ne koleru, Sanktulo, mi volas diri ion al vi.

**Vukong:** Diru!

**Ora Stelo:** Vi retiru la trupojn kaj ĉesigu la batalon. Mi petos la Ĉielan Imperiestron por vin promocii.

**Vukong:** Ba! Denove vi provas min trompi per belaj vortoj! *(Li forĵetas la Oran Stelon per piedbato.)*

*(En nubo montriĝas Ĉiela Palaco. Vukong ekfrapegas per sia bastono. Aŭdiĝas bruego kaj la palaco frakasiĝas.)*

## Epilogo Triumfo

*(Sur la Monto de Floroj kaj Fruktoj. Kiam leviĝas la kurteno, falas el la ĉielo la fronta tabulo kun la nomo de la frakasita halo.)*

**Simio A (legas):** “Linghiaŭ-halo”. Lia eksce-lenco frakasis la ĉielan palacon!

**Amaso:** O! —

*(En ĥora kanto envenas Vukong kaj post li iras la Ĉefsimio tenante flagon kun la surskribo “Ĉielegala Sanktulo”).*

**Amaso:** Venkis nia ĉefo!

**Monstro-Bovo:** Via eksce-lenco triumfe revenas al la monto. Jen ĉefoj-fratoj de diversaj kavernoj alvenas por vin gratuli.

**Vukong:** Knaboj, aranĝu festenon, ke ni kune festu!

**Amaso:** Jes!

*(Ĉiuj ekdancas.)*

*(Ĥoro:)*

*Per bato de la magia bastono,  
jam frakasiĝis Ĉiela Palaco.*

*De nun ekestos al ĉiu persono,*

*Digneco, ĝojo, libero kaj paco.*

*“Ĉielegala Sanktul’” — jen nomo  
Triumfe brilas tra tuta la spaco!*

*(Kurteno falas.)*



*Ekzerco sub reĝisorado*

# Vizito al la Ĉina Pupteatra Trupo

de LAŬ BAJ

**L**A Ĉina Pupteatra Trupo situas en malnovtipa korto de la urbo Pekino. Enirinte en la korton, mi tuj vidis geaktorajn sin ekzercantaj en ludado de muzikiloj, aŭ en kantado, aŭ en deklamado, aŭ en manipulado. Ĉie regis varma atmosfero.

Respondeculo de la trupo Feng Ŝuhiang kaj reĝisoro Ĝoŭ Di estas mezaĝaj kaj la antaŭa estas unu el la kreintoj de la trupo. Li diris al mi, ke la trupo estis fondita en 1955 kaj ludas ĉefe per stangaj pupoj. Dum la pasintaj pli ol 20 jaroj, ili verkis kaj ludis plurajn eminentajn programojn, ekzemple «Lerta Virineto», «Sinjoro Dongguo», «Kokeriko en Noktomezo», «Ruĝaj Floroj sur Stepoj», «Mi Amas Pekinan Tiananmen» kaj «Ribelo kontraŭ la Ĉiela Palaco», kaj krome «La Pupa Arto de Ĉinio», «Tintileto»

kaj du aliaj teatraĵoj luditaj de ĝi estis filmitaj. En 1956 kaj 1965 la trupo faris dufoje turneojn en iuj landoj de Azio, Afriko kaj Eŭropo, kaj samtempe lernis de tieaj kolegoj multajn valorajn spertojn.

Nun la trupo havas pli ol 40 aktorojn, el kiuj kvarono estas veteranaj kun tridekjara sceneja sperto. La veteranoj sin okupiĝas ne nur pri prezentado, sed ankaŭ pri verkado de teatraĵoj, reĝisorado kaj kulturo de novaj aktoroj. La novaj aktoroj varbitaj en la lastaj jaroj jam lertas en ludado dank' al sia diligenta lernado. Nun la tuta trupo aktive preparas sin por ludi en Jugoslavio.

Akompanate de reĝisoro Ĝoŭ, mi venis al la pupfara sekcio. Du veteranaj artistoj absorbite faras kapojn de Sun Vukong, heroo de la puptea-

trajo “Ribelo kontraŭ la Ĉiela Palaco”. Sur stablo kuŝis vico da figuroj de aliaj personoj de la teatraĵo. Ĉu viroj aŭ virinoj, ĉu maljunuloj aŭ infanoj, ĉiuj figuroj estas delikataj kaj vivecaj en hiperbola maniero. Reĝisoro Ĝoŭ montris al mi platan persikon en grandeco de volejbalo. Se ĝi estus sur scenejo, mi ja ne povus distingi ĝin de vera persiko. Por ke fremdlandaj amikoj povu bone spekti la pupteatraĵon, ili renovigis ĉiujn figurojn kaj rekvizitojn. Kiam ni venis al la kostuma sekcio, tri virinoj estis okupitaj pri faro de belaj kostumoj por la feinoj. La kostumoj estas en antikva stilo kun longaj manikoj el roza gazo kaj ĉarme brilas kune kun la aldonita lazura gazrubando. Franjo Li de la sekcio ŝerce diris: “Ĉar niaj feinoj vizitos fremdan landon, ni devas fari al ili pli belajn vestojn”. La trupo havas ankaŭ malgrandan orkestron. Laŭ la ĉarma melodio fluanta el la ekzercejo, mi konjektis, ke tiu estas komponaĵo de la teatraĵo «Ribelo kontraŭ la Ĉiela Palaco».

Des pli interese estas, ke la trupo lastatempe starigis Esperantan kurson por fari estonte prezentadon en la lingvo. Kiam mi kaj la reĝisoro venis al la ĉambro, la kursanoj estis ekzercantaj sin en prononcado. La kurso konsistas el 15 lernantoj, tamen en ĝi lernas ankaŭ nombro da interesitoj. Ĉiusemajne estas kvar lecionoj po du horoj. Ili ĉiuj lernas diligente. Dubo tamen venis al mi, ĉu oni povas ellerni Esperanton en tiel mallonga tempo, ĉar Esperanto kaj la han-a lingvo diferencas ne nur en prononco sed ankaŭ en skribosistemo kaj gramatiko. Ĉu oni sukcesos ludi en Esperanto? Reĝisoro Ĝoŭ diris: Lerno de Esperanto kaj ludo en Esperanto estas komuna deziro de ĉiuj aktoroj. Kvankam ni tiam eble ne povos bone paroli en Esperanto, ni tamen atingos sukceson se nur ni povos esprimi nian sincerecon kaj amikecon. Veterana aktoro Li Kianjuan diris kun memfido: “Mia grandaĝeco multe malfaciligas al mi lernadon de Esperanto. Tial mi devas pli diligente kaj pli multe lerni por interŝanĝi teknikon kun kolegoj en estonteco per Esperanto.”

Je tio, venis al mi en la kapon ĉina proverbo: Nenio en la mondo malfacilas, se nur oni havas decidemon.

# Vizito al

de NIA RAPORTISTO

**I**UN tagon de junio, mi kune kun gvidantoj de kompanio de oceana transportado veturis al ankrejo de la haveno per motorboato por bonvenigi la ŝipon “Hanĉuan”, kiu ĵus revenis de Hamburgo de GFR plensarĝite per grandaj ekipaĵoj.

Rapide malaperis post ni la dokoj de la Nova Haveno de Tiangin kaj prezentiĝis antaŭ ni ĝetkajo kun multaj alte starantaj grupoj kaj oceanaj ŝipoj malŝarĝataj. La hele griza ŝipo “Daĉeng” ĵus revenis de Rumanio, reportinte grandajn maŝinojn, kaj ĝiaj V-formaj levstangoj kun levpovo de 350 tunoj estas montrantaj sian potencon kapablon. Pli antaŭe, ni vidis konstruitan konteneran dokon, kie bruadis baskulkamionoj kaj ŝovelmaŝinoj . . .

## I

Post kiam nia motorboato preterpasis la lumturon de Dagukoŭ, ni fine vidis en teleskopo la 15,000-tonelan ŝipon “Hanĉuan”. Al ĝiaj ferdekoj alligis pli ol 40 grandaj kompletaj ekipaĵoj importitaj de la Tiangin-a Kemifibra Fabriko, el kiuj unu giganta ekipaĵo havas longecon de tri vagonoj, diametron de ĉ. 4 metroj kaj pezon de pli ol 90 tunoj. Kiam la ŝipanoj informiĝis, en Hamburga Haveno antaŭ unu monato, ke la varoj estas urĝe bezonataj de la fabriko, la deziro fari multan kontribuon al la industria modernigo de la patrolando instigis ilin krei elstaran transportan projekton, tiel ke la ŝarĝkapablo de la ŝipo pliiĝis je 50%. Tiam eĉ la direktoroj de Hamburga Haveno kaj ĝiaj dokoj miris, ke tiel plene ŝarĝita ŝipo estas malofte vidita, kaj ili aparte faris al ĝi kolorajn fotojn kaj ilin donacis al la ŝipestro. Ankaŭ ŝipestroj de aliaj landoj

.....





en la haveno venis stirante motorboaton por ĝin rigardi kaj adiaŭi.

Ni ascendis la menciitan ŝipon, kiu plurfoje spertis 7-gradan ventegon sur la Hindia Oceano kaj la Orienta Ĉina Maro, kaj propraokule vidis, ke sendifektaj estas ĉiuj varoj, ĉu sur la ferdekoj aŭ en la trietaĝaj holdoj. Kamarado Li Guotang, kiu kune kun mi ascendis la ŝipon, estis la komisaro de la ŝipo "Paco" unuafoje naviginta al Gvineo en la sesdekaj jaroj post fondo de la ĉina oceana ŝiparo. Li prezentis al mi Bej Hanting, estron de la ŝipo "Hančuan". Li estas veterana maristo kun aĝo de pli ol 50 jaroj kaj akumulis multan sperton pri mara navigado en sia marista vivo de pli ol 20 jaroj. Antaŭ pluraj jaroj li unufoje transportis de eksterlando 500 kamionojn, inter kiuj 8 estis alligitaj al la stirejo. Nun ŝipestro Bej donas pli da atento al kulturado de junaj stiristoj kaj kuraĝigas ilin lertigi sin en stirado.

## II

Rigardante al la vasta maro kaj la ŝipoj ankriĝantaj en la Nova Haveno de Tiangin — la pordo de nia ĉefurbo, kamarado Li Guotang rememoris pri la disvolviĝo de nia oceana transportado:

"En 1961 nia lando havis nur unu ŝipon 'Guanghua' kaj la du aliajn ŝipojn 'Paco' kaj 'Amikeco' produktitajn de nia lando. Tiutempe la ŝipo 'Paco', sur kiu mi laboris, estis nur 6,000-tonela ŝipo ekipita de vapora turbino kaj malpli granda ol ĉiuj niaj nunaj oceanaĵoj. Sed ĝi rompita blokado de imperiismo, eltenis 9-gradan ŝtormon en Mediteraneo, unuafoje atingis

Gvineon, kaj per tio komenciĝis nia oceana transportado.

"Nun, niaj oceanaĵaj navigaj linioj jam etendis al la kvin kontinentoj. Niaj oceanaĵaj ŝipoj atingis 383 havenojn de 96 landoj kaj regionoj tra la tuta mondo. La transporta ŝiparo por diversaj kargoj, lozaj kargoj, petrolo kaj pasaĝeroj fariĝis ĉefa forto por transporti importitajn kaj eksportitajn varojn kaj varojn por helpi fremdlandojn kaj plenumas 80% de la importadoj kaj eksportadoj de nia lando. Tio signifas, ke la unuapaŝa projekto de Ĉefministro Ĝou Enlaj dum lia vivo estis efektiva.

*Estro de la ŝipo "Hančuan"  
Bej Hanting en la stirejo*



“En la lastaj 5 jaroj, por adaptiĝi al la disvolviĝo de nia oceana transportado, nia ŝtato pliiĝis nombron da profundaj ĝetkajoj ĉe niaj marhavenoj, kiuj superis la totalan nombron de la antaŭaj 23 jaroj post la Liberiĝo, kaj la havena ŝarĝ- kaj malŝarĝa kapablo pliiĝis je 50%.”

En la komencaj jaroj de la 15-a jarcento, Ĉinio jam estis lando avangarda en ŝipofarado kaj marnavigado. Nia marnavigisto Ĝeng He iam veturis al la bordo de la orienta Afriko kun granda ŝiparo sub sia gvido. Li vizitis pli ol 30 aziajn kaj afrikajn landojn en sia sepfoja navigado.

Sed de la 19-a jarcento Ĉinio multe suferis agreson kaj prirabodon de imperiistoj kaj iom post iom fariĝis duonkolonio. Per neegalaj traktatoj la imperiismaj potencoj regis la pordojn de Ĉinio kaj monopolis nian maran transportadon.

Laŭ statistiko de 1973, nur en Ŝanhajo estis pli ol 60 fremdlandaj ŝipaj kompanioj, kaj plejparto de la dokoj kaj staploj en tiu loko estis tenata en la manoj de imperiistoj. Nur post la fondiĝo de la nova Ĉinio, nia oceana transportado komenciĝis kaj havas tiel brilan perspektivon.

### III

En kontaktiĝo kun kelkaj veteranaj maristoj, mi informiĝis, ke kvankam Ĉinio jam komencis enkonduki iujn novajn ekipaĵojn kaj novajn teknikojn de fremdaj landoj kiel sputnika pilotado por sia oceana ŝiparo, tamen ĝi ankoraŭ emfazas teknikan renovigon kaj plene utiligas la nunajn ekipaĵojn. Ŝipestro Bej Hanting diris al mi: “Se ne estus la komuna klopodo de la tuta ŝipanaro, nia ŝipo ne povus esti tiel plene kargita, en ĉifoja navigado de Hamburgo al Ĉinio.” Post momenta medito li daŭrigis: “Kompreneble, se

*5,000 kubmetroj da kompletaj ekipaĵoj metitaj en la kajutoj kaj sur la ferdeko*



ni ne konus la sezonon kaj apartan veteron sur la irota naviga linio kaj la kapablon de nia ŝipo, ni ne kuraĝus ŝarĝi nian ŝipon plene per tiuj gigantaj ekipaĵoj.”

En la interparolado, mi legis sur la sunbruna vizaĝo de ŝipestro Bej lian diligentan kaj sinofereman spiriton al la marnaviga afero de la patrolando.

Antaŭ 29 jaroj, post kiam li diplomiĝis el la marnaviga fakultato de la Vusong-a Komercŝipa Instituto de Ŝanhajo, li komencis sian marnavigan vivon, kaj poste promociiĝis de tria maato al ŝipestro. Kun tempopaso li des pli amas la maron kaj prenas la ŝipon kiel sian hejmon. Kiam la “kvarpersona bando” furiozis, li provizore forlasis la stirejon devigite. Post certa tempo li revenis inter siajn kolegojn. De tiam, kvazaŭ ekipite de motoro, li havas neelĉerpeblan energion. Li bone konas staton de multaj fremdlandaj havenoj kaj ĉiamaniere klopodas per nokta navigado por malpliigi neproduktan tempon de sia ŝipo dum ankriĝo en havenoj. Ŝipanoj diris, ke ilia ŝipestro tre diligente studas marnavigajn materialojn en- kaj eksterlandajn. Pro tio, kiam li ricevis taskon navigi al la Kariba Maro unuafoje, li povis tuj ekveturigi sian ŝipon rekte al Ameriko de Eŭropo tra Atlantiko kaj revenis



*Ŝipanoj zorgeme firmigas la grandajn ekipaĵojn de la Tiangina Kemifibra Fabriko.*

al la patrolando post ĉirkaŭiro de la terĝlobo.

Iu el junaj stiristoj admire diris al mi: “Dum navigado ŝipestro Bej ĉiam postulas, ke ni diligente observu astronomiajn fenomenojn kaj kalkulu la pozicion de la ŝipo. Por kulturi nin junulojn, li entuziasme konigis al ni teknikan scion, influis nin per sia modela ago, faris al ni ekzamenon en difinita tempo kaj donis al ni ŝancon ekzerci nin per manipula tekniko.”



*Kadroj de la ŝipo studas kiel bone ŝarĝi la ŝipon per grandaj ekipaĵoj per desegnaĵo.*

## *Ĉiuj strebas antaŭen*

**D**UM vizitado al Ŝanhajo, ni ĝoje vidis ardan socialisman laborkonkurson en la tekstila branĉo de tiu urbo.

Kiam ni eniris la 27-an Tekstan Fabrikon de Ŝanhajo, nia atento tuj estis altirata de konkursa grafikajo kun la titolo "Kiu la unua atingos Pekinon?" La grafikajo prezentis kelkajn laboristinojn, kiuj vetkuras sur ruĝa linio de Ŝanhajo al Pekino. Ĝi figure montris kiel iras la laborkonkurso disvolviĝanta en la fabriko por "kontinue produkti dekmil metrojn da bonkvalita ŝtofo".

Tiu malgranda fabriko havas nur 360 laboristojn. Maŭ Hinhian, la tutlanda famkonata labor-

modelo kaj alterna membro de la Centra Komitato de KPC, estas laboristino de la fabriko. En 1977, 34 teksistinoj de la fabriko iris en vicon de la avangarduloj, kiuj produktis kontinue dekmil metrojn da bonkvalita ŝtofo. Tutjare ili sume teksis 1.46 milionojn da metroj da bonkvalita ŝtofo, kaj tiu longo ĝuste egalas la distancon inter Ŝanhajo kaj Pekino. Laŭ antaŭa plano tiu tasko devus esti plenumita antaŭ la Unua de Majo de 1978, sed ili ĝin plenumis antaŭdate je kvar monatoj. Nun ili ankoraŭ daŭrigas la konkurson kaj decidis refoje atingi tiun longecon de bonkvalita ŝtofo antaŭ la Nacia Festo je la unua de oktobro de la kuranta jaro, nome je tri monatoj pli frue ol pasintjare.



*Ĉangĝoŭ-aj kaj ŝanhaj-aj teksistinoj interŝanĝas spertojn.*

Maŭ Hinhian



Depost la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, laborkonkurso vaste disvolviĝis inter la laboristoj. En tiu konkurso la laboristaj amasoj, kiuj fariĝis mastroj de la ŝtato, plene montris sian aktivecon kaj kreemon. En la kvindekaj jaroj de la kuranta jarcento, grandnombre aperis, inter la ŝpinteksaj laboristinoj de Ŝanhajo, tutlandaj labormodeloj fame konataj kiel Jang Fuĝen kaj Ji Ŝigjuan. En la sepdekaj jaroj, aperis en la konkurso por “kontinue produkti dekmil metrojn da bonkvalita ŝtofo” lertaj teksistinoj kiel Maŭ Hinhian, kiu kreis novan rekordon kontinue produkti kvarcent mil metrojn da bonkvalita ŝtofo.

Sekretario de la komitato de la Komunisma Junulara Ligo de la 27-a Fabriko Ju Lingmej diris: En la amasa movado de lerno de Daking en industrio en 1973, ankaŭ en ilia fabriko disvolviĝis laborkonkurso por “kontinue produkti dekmil metrojn da bonkvalita ŝtofo” inter teksistinoj. Por atingi la celon, teksistino devas absorbite labori ĉ. du semajnojn kun plenumo de taga produktokvanto de naŭcent metroj. Tio ja ne estas facila afero por teksistino.

Ju Lingmej kaj Maŭ Hinhian kune laboris en multaj jaroj. Ŝi daŭrigis: En la komenco al la 22-jara Maŭ Hinhian mankis firma memfido venki malfacilojn. Ĝuste tiam ŝi aĉetis novan veston, kiu havis difektaĵon ĉe la manikfino, kaj

pro tio ŝi malĝojiĝis. Ŝia patrino diris al ŝi kun profunda signifo: “Ankaŭ vi estas teksistino, ĉu ne?” Ŝia simpla vorto forte tuŝis la koron de la knabino. La lasta pensis en si: La Daking-anoj laboras tiel konsciencie ke la olekampo konstruita de ili havas altan kvaliton kaj bone trapasis la ekzamenon de la tempo; kiom da bonkvalita ŝtofo la malnova labormodelo Jang Fuĝen teksis por la popolo; ja ankaŭ mi estas teksistino, do ankaŭ mi devas tiel fari. Alie, per ŝtofo kun difektaĵo mi certe kaŭzos malkontenton al la popolamasoj. Depost tiam, ŝi laboris konsciencie kun penemo. Baldaŭ ŝi kaj kelkaj junaj laboristinoj unuafoje ricevis venkan ruĝan flagon pro “kontinue produkti dekmil metrojn da bonkvalita ŝtofo”. De tiam la rekordo de bonkvalita ŝtofo produktita de Maŭ Hinhian leviĝas tagon post tago, monaton post monato. En la konkurso de majo de 1973 ĝis februaro de 1975, ŝi ĉiam staris en la unua loko kaj kreis la eminentan rekordon kontinue produkti kvarcent mil metrojn da bonkvalita ŝtofo.

Sub ŝia influo, la teksistinoj de la fabriko ĉiuj atingis la nivelon kontinue teksiti dekmil metrojn da bonkvalita ŝtofo. Informiĝinte pri tio, laboristoj de aliaj fabrikoj venis al la fabriko por lerni de Maŭ Hinhian. Sed, la energia klopodado de la laboristoj por socialismo estis riproĉita de

la “kvarpersona bando” de Vang Hongven, Ĝang Ĉunkiaŭ, Ĝiang King kaj Jaŭ Venjuan kaj iliaj kunuloj en Ŝanhajo. Ili kritikis la fabrikojn, kiuj disvolvis laborkonkurson, ke ili “praktikas produktivismon”, kaj kalumniis, ke Maŭ Hinhian estas tipo “nur zorgi fadenon, sed ne politikan linion”. La laborkonkurso de la fabriko kaj aliaj fabrikoj de ŝpinteksa fronto estis influita. Sed Maŭ Hinhian pensis en si: Mi estas teksistino kaj devas multe teksti bonan ŝtofon por la ŝtato. Ŝi estis rigora al si mem kaj kreis la rekordon kontinue produkti sesdek mil metrojn da bonkvalita ŝtofo.

Ju Lingmej diris ĝoje: La socialisma laborkonkurso refoje vigle disvolviĝis en printempo de 1977 post faligo de la “kvarpersona bando”. Tiam la laŭdinda faro de Maŭ Hinhian jam estis vaste konata de amasoj dank’ al propagando per ĵurnaloj kaj radio. Multaj teksistinoj ŝin admiris kaj decidis lerni de ŝi la spiriton klopori por teksti bonkvalitan ŝtofon por la popolo.

Sub alvoko de la Tekstila Buroo de Ŝanhajo, socialisma laborkonkurso kun bonkvalita kaj altkvanta produktado kiel la ĉefa enhavo vaste disvolviĝis inter diversaj fabrikoj, laborejoj, skipoj kaj laboristoj. Diversspecaj laboristoj elmetis konkretajn konkursajn celojn laŭ la karakterizoj de sia laboro. Ekzemple, laboristoj por amelado de fadenoj elmetis la celojn “cent bobenoj

sen difekto”; ŝtofekzamenistoj la celojn “centmil metroj sen preterlaso en ekzamenado”; silkaĵteksistoj la celojn “kontinue produkti mil metrojn da bonkvalita silkajo”; prestinkturistoj la celojn “centmil metroj sen fuŝprestinkturo”; eĉ kontistoj kaj ŝoforoj elmetis respektive siajn konkursajn sloganojn “ducent mil kontoj sen eraro” kaj “ducent mil kilometroj sen akcidento”. Preskaŭ ĉiuj 390,000 ŝpinteksistoj de la urbo partoprenis en la senprecedence grandskala konkurso.

La laborkonkurso vigligis diversflankajn aktivajn faktorojn, la avangardaj laboristoj progresas senĉese kaj la postĝintaj rapide kuratingis ilin. Ŝaŭ Gujdi, teksistino de la 16-a Prestinktura Fabriko de Ŝanhajo, estas unu el tiuj ekzemploj.

En la tagoj, kiam la “kvarpersona bando” faris furiozan subfosadon, ŝi estis serioze influita de anarkiismo kaj ofte forlasis siajn teksmaŝinojn por babiladi en deĵoro. Pro tio ĉiumonate ŝi difektis 5-6 rulaĵojn (1 rulaĵo = 30 metroj) da ŝtofo. Post la faligo de la “kvarpersona bando” Prezidanto Hua alvokis ke ĉiuj “tenu klasbatalon, ordigu la ŝtaton por akiri grandan atingon en tri jaroj”. En la tuta fabriko la moro ŝanĝiĝis. Energie labori por socialismo fariĝis glora afero. Ŝaŭ Gujdi ankaŭ ricevis tre grandan kuraĝigon. Ŝi venis al la 27-a Fabriko kun siaj kolegoj por lerni de Maŭ Hinhian kaj aliĝis al la konkursa vico por “kontinue produkti dekmil metrojn da bonkvalita ŝtofo”.

Ŝaŭ Gujdi tute ŝanĝiĝis. Ĉiumatene ŝi tre frue venis al la laborĉambro kaj faris diversajn preparajn laborojn antaŭ deĵoro. Dum la ok-hora deĵoro, ŝi manipulis rigore laŭ la regularo, ofte rondiris kaj zorge ekzamenis. Nun jam en naŭ sinsekvaj monatoj ŝi ne produktis difektitan ŝtofon kaj fariĝis avangarda produktanto.

En la ŝanhajaj prestinkturaj entreprenoj ĉirkulas rakonto pri tio ke la 11-a kaj la 5-a prestinkturaj fabrikoj lernas unu la alian kaj kune antaŭenmarŝas.

Dum vizitado al la 11-a Fabriko, konsciencia laborado de la laboristoj donis al ni tre bonan impreson. En la pasinteco, kiam la fabriko sufe-

*Laboristoj de la Kvina kaj Dekunua Tinkturaj Fabrikoj interŝanĝas spertojn.*



ris seriozan anarkiisman influon kaŭzitan de la "kvarpersona bando", la raciaj regularoj kaj sistemoj estis detruitaj, la kvalito de produktaĵoj estis sub la ŝtata normo kaj pli ol 77% de la katuno estis fuŝprestinkturita. En aprilo de la pasinta jaro, la gvidanto de la fabriko kondukis lernan grupon konsistantan el kadro kaj laboristoj al la Daking-tipa entrepreno la 5-a Prestinktura Fabriko por lerni de ĝi. Laŭ la progresiva sperto de la 5-a Fabriko, ili vaste mobilizis amasojn por kritiki la absurdajn asertojn de la "kvarpersona bando" en subfosado de la produktado, eliminis ilian malbonan influon, restarigis kaj perfektigis diversajn regularojn kaj sistemojn kaj organizis laborkonkursion inter laborejoj kaj skipoj. Post kelkaj monatoj, la fizionomio de la fabriko ricevis rimarkindan ŝanĝiĝon, ili ne nur ĉiumonate plenumis la produktan planon, sed ankaŭ rapide malmultigis la procentojn de fuŝprestinktura katuno ĝis 8.6% kaj ĉampioniĝis. Ankaŭ la 5-a Fabriko sentis koran ĝojon pro la progreso de la frata fabriko, sendis lernan grupon al la 11-a Fabriko por lerni de ĝi avangardan sperton kaj pluapase akcelis sian laboron.

En la pasinteco, la du fabrikoj situantaj respektive en la orienta kaj okcidenta partoj de la

urbo havis neniun interrilaton, tamen en la socialisma laborkonkurso ili fariĝis intimaj amikoj. Ili ofte interŝanĝis informojn kaj spertojn. En januaro de la kuranta jaro, la ok ekonomiaj kaj teknikaj normoj de la 5-a Fabriko, inkluzive de produktokvanto, produktokvalito kaj la procentoj de eksporta katuno jam superis la plej bonan nivelon en la historio de la fabriko kaj samtempe oni kreis la rekordon en kontinua produkto de sescent tridek mil metroj da bone prestinkturita ŝtofo. Ankaŭ la 11-a Fabriko estis elektita kiel avangarda unuo inter la prestinkturaj entreprenoj en lernado de Daking.

En la laborkonkurso de la lasta jaro, la ŝanhajaj tekstilaj entreprenoj plenumis la ok ekonomiajn celojn difinitajn de la ŝtato pri produktokvanto, specoj, kvalito, produktokosto, profito k. a., kaj la produktovaloro plimultiĝis je 10.7% kompare kun tiu de la antaŭlasta jaro. En la unua sezono de la kuranta jaro, oni faris sukcesplenan komencon. En aprilo kaj majo oni atingis rekordan nivelon en la historio, la totala produktovaloro plimultiĝis je 21% kompare kun tiu de la sama periodo de la lasta jaro. Nun 80% de la teksistinoj de la tekstilaj entreprenoj de la tuta urbo jam sukcesis kontinue produkti dekmil metrojn da bonkvalita ŝtofo.



## Ĉinaj Geesperantistoj al 63-a U.K.

Ĉina Esperanto-Ligo sendis al la 63-a Universala Kongreso de Esperanto 4-membran delegacion estratan de Ĝang Kiĉeng (Ĉ. Ĉen), membro de la Konstanta Konsilantaro de la Ligo. En la mateno de la 27-a de julio ili ekflugis de Pekino al Bulgario. Tio estas bona ŝanco por pliiĝi la amikecon kaj interkompreniĝon inter la ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj.

## Korespondi Deziras

\* Alison Pirtchard, lernantino 15-j. kaj Sally Goatham, lernantino 17-j., pere de s-ro C.B. Johnson, The Ecclesbourne School, Duffield, Derby, DE6 4GS, Britio, kun gekomencantoj ĉinaj.

\* Eric Fredin, pensiulo, Enegatan 4, 23400 Lomma, Svedio, kun ĉina esp-isto.

\* David Simpson, studento 17-j., 987 Harmony Lane, South Charles-

ton, WV 25303, Usono, kun samaĝa ĉina esp-isto.

\* Jaroslav Zak, Na pastvisku 1, CS 747 05 Opava 5, Ĉeĥoslovakio, kun ĉina esp-isto.

\* Bertok Zoltan, instruisto 25-j., H-8100 Varpalota, Kremnica 1, Hungario, kun ĉina esp-isto.

\* Esp. grupanoj junaj kaj maljunaj, pere de s-ro Despujols, 96 rue des Tuileries, 87 100 Limoges, Francio, kun ĉinaj esp-istoj.

# Pro la komisio de Ĉefministro Ĝoŭ

**E**N januaro de 1966, post fino de la kunveno de kotonkulturaj specialistoj de nia tuta lando pri la problemo de falo de kotonaj florbutonoj kaj fruktoj, Ĉefministro Ĝoŭ diris al Vu Giĉang, varme tenante lian manon: “Mi konfidas al vi la taskon solvi la problemon de falo de kotonaj florbutonoj kaj fruktoj. Ni plenumu tiun ĉi taskon donitan de Prezidanto Maŭ en 20 jaroj.” Kaj firme premante la manon de Ĉefministro Ĝoŭ, Vu Giĉang respondis sonore: “Bone!”

Vu Giĉang estas ordinara kamparano de Sujanĝ-brigado de Venhi-gubernio, Ŝanhi-provinco. Dank’ al sia persista esploro en scienco, li sukcesis krei unu post alia naŭ sciencajn teknikojn en kulturado de kotono, inkluzive de “kulturado de plantidoj en malvarmabedo” kaj “transplanto de ĝermoplantoj”. Por disvastigi lian sperton, *Renmin Ribao* (Popola Ĵurnalo) publikigis specialan ĉefartikolon. Prezidanto Maŭ kaj Ĉefministro Ĝoŭ plurfoje akceptis lin kaj laŭdis lian kontribuon al la ŝtato.



*Vu Giĉang*



Post la dirita kunveno, Vu Giĉang revenis al sia hejmloko kaj tuj sciigis al siaj samlokanoj la taskon donitan de Ĉefministro Ĝoŭ. Ili kune faris multajn komparajn eksperimentojn pri kulturado de koton. Li observadis kaj esploris tage kaj nokte en kotonaj kampoj kaj eĉ manĝis ĉe kamprando, por ne interrompi sian observadon. Por ne forgesi la komision donitan de Ĉefministro Ĝoŭ kaj povi ĉie observi por trovi idealan tipon de kotonplanto, li speciale pendigis kotonplantojn sub la tegmentrando, sur muroj kaj arboj kaj antaŭ la fenestroj de sia domo.

Sed neatendite, en la Granda Proleta Kultura Revolucio, Lin Biaŭ kaj la "kvarpersona bando" elmetis reakciajn sloganojn suspekti ĉion, faligi ĉion kaj nei ĉion, direktante la lancpinton de batalo al la revoluciaj kadroj kaj popolanoj. En tiu kontraŭfluo, malmultaj aĉuloj kun kaŝita celo kalumniis, ke Vu Giĉang estas falsa labor-modelo kaj ke lia esploro pri koton estas "meti teknikon en komandon". Sed Vu Giĉang pensis, ke se la problemo de defalo de kotonfruktoj estos solvita kaj ĉiu kotonplanto donos unu frukton pli multe, tiam ĉiu muo (1/15 hektaro) da kotonkampo povos pliprodukti pli ol 5 kilogramojn da sensemigita koton. En nia lando estas multe da kotonkampoj, do la rezulto estos granda. Tial li timis nek minacon nek baton kaj persistadis en eksperimentado. Foje Vu Giĉang vidis, ke veterana melonkulturisto forigis la pinton de melonplanto, apenaŭ aperis al ĝi du veraj folioj, kaj poste inter la du folioj elkreskis du tigoj. Dank' al tia aranĝo, la planto donis fruktojn frue, multe kaj sen defalo. Vu Giĉang ricevis de tio la ideon same trakti kotonplanton, por ke ĝi elkreskigu du tigojn kaj donu fruktojn frue, multe kaj sen defalo.

Li tuj elektis du kotonplantojn kun po du apenaŭ elkreskintaj veraj folioj, faris signojn al ili kaj forigis iliajn pintojn. Post kelkaj tagoj, tiuj plantoj vere elkreskigis po du tigojn. Vu Giĉang tre ĝojis pro tio kaj ĉiutage iris al ili plurfoje por ilin flegi. Tiamaniere forpasis multaj tagoj kaj noktoj, kaj Vu Giĉang fine akiris bonan konon pri la kotonplantoj kaj iom post iom konis

la rilatojn inter la tempo de falo de florbutonoj kaj fruktoj kaj la kondiĉoj de akvo, sterko, lumo kaj temperaturo. La grundo de Sujang-brigado estas malbona kaj la senprujna periodo de tiu loko estas nur ĉ. 180 tagoj. En 1973, tamen lia eksperimento ricevis unuapaŝan sukceson.

Rimarkinte ke Vu Giĉang plue klopodas por fari sciencajn esplorojn, la uloj profunde influitaj de la "kvarpersona bando" ankoraŭ pli forte malamis lin. Per ĉiaj rimedoj ili batis Vu Giĉang, ne lasis lin alproksimiĝi al la kotonkampoj kaj ne permesis al li fari sciencan esploron. Ĝuste kiam li renkontis malfacilojn, Ĉefministro Ĝoŭ tre zorgis pri li kaj multfoje donis instrukciojn, por ke li daŭrigu sian eksperimenton. Post la frakaso de la "kvarpersona bando" en 1976, Vu Giĉang plene liberiĝis finfine. Kun vigla animo li ankoraŭ pli energie faras sciencan esploron pri koton. Post elkulturo de dutigaj kotonplantoj, li ankaŭ elkulturis alian novan specon de kotonplanto kun pluraj tigoj kaj duetaĝa foliaro. Tia nova kotonarbeto povas pli multe utiligi sunlumon, pli bone aerumiĝi kaj doni 5-6 fruktojn pli multe ol dutiga kotonplanto kaj 11 fruktojn pli multe ol ordinara kotonplanto. En solvo de la malfacila scienca problemo de defalo de florbutonoj kaj fruktoj de kotonplanto, Vu Giĉang atingis multesignifan sukceson.

La 5-a de marto de la kuranta jaro estis la 80-a datreveno de la naskiĝo de Ĉefministro Ĝoŭ. Koincide kun ĝia celebros, Vu Giĉang ĉeestis, kiel reprezentanto, la Kvinan Tutlandan Popolan Kongreson kaj la Tutlandan Sciencan Konferencon. La 69-jara Vu Giĉang tre emociiĝis post aŭskulto de la parolado de Prezidanto Hua Guofeng. Li diris, ke restos ankoraŭ 8 jaroj ĝis la dato difinita por plenumi la taskon konfiditan de Ĉefministro Ĝoŭ, kaj li decidis solvi la problemon de defalo de kotonfruktoj je 5 jaroj antaŭdate, altigi la muan produktokvanton de koton super 250 kg. en lia aĝo de 70 jaroj, por efektiviĝi la deziron de la forpasintaj Prezidanto Maŭ kaj Ĉefministro Ĝoŭ.

\*\*\*\*\*

# Korekto de venĝa miskondamno

**E**N la urbo Huajbej de Anhuj-provinco en orienta parto de nia lando cirkulas rakonto, ke la Anhuj-a Komitato kaj la Huajbej-a Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio ĝisfunde renversis la miskondamnon al Hiaŭ Juĝu, kiu iam suferis venĝeman persekuton, kaj restarigis sian bonan reputacion. Oni diris ĝoje: Post la faligo de la “kvarpersona bando” de Vang-Ĝang-Giang-Jaŭ, justeco stariĝas kaj la miskondamno estas renversita. Tio estas vere ĝojiga afero.

Renverso de miskondamno al homoj, kiuj ricevis venĝeman rebaton, estas unu el la gravaj paŝoj faritaj de diversaj lokoj por restarigi la bonajn tradiciojn kaj laborstilon de la Partio, disvolvi socialisman demokration kaj rigore observi la socialisman leĝan sistemon.

La rakonto pri la renverso de la miskondamno al Hiaŭ Juĝu devas komenciĝi de la okazaĵo en la mezo de novembro de 1977. Antaŭtagmeze de iu dimanĉo, iu mezaĝa virino venis, subtenate de sia maljuna patrino, al la oficejo de la Anhuj-a Komitato de KPC, zorganta pri leteroj kaj vizitoj de popolamasoj. Ŝi nomiĝas Hiaŭ Juĝu, aktorino de la Huajbej-a Jugju-opera Trupo. Ĉar ŝi malkaŝis ke Huang Gjun, estro de la urba Kultura Buroo kaj aliaj gvidantoj Pan Ĉang-ju, Liu Ŝinian kaj vicestro de la Jugju-opera Trupo Liaŭ Ĝili k.a. malobservis disciplinon de la Partio kaj leĝon de la ŝtato, ŝi suferis ilian kruelan venĝeman persekuton. Pro tio ŝi speciale venis al la oficejo por plendi.

Laborantoj de la oficejo entuziasme donis al ili teon kaj seĝojn, por ke ili sidiĝu kaj rakontu detale. Hiaŭ Juĝu diris, ke en oktobro de 1976,

ŝi kaj aliaj du lernantoj de la opera trupo skribis leteron, sub helpo de samvilaĝano Ŝi Buhua, kiu laboras en la urba Agrikultura kaj Fostokultura Buroo, al supera gvidanto por malkaŝi ke Liu Ŝinian kaj liaj kunuloj instalas, utiligante sian potencon, en la operan trupon parencojn kaj konfidulojn kiel aktorojn, al kiuj mankis necesaj kondiĉoj, kaj akceptis monon kaj donacojn de lernantoj-kandidatoj por helpi ilin trapasi eniran ekzamenon. Liu Ŝinian eĉ elektis el ili knabinon por ŝin fianĉinigi al sia bofrato, sed la knabino ne konsentis kaj pro tio ŝi suferis persekuton.

Hiaŭ Juĝu diris: Sub la influo de burĝabanda ideologio de la “kvarpersona bando” kaj por protekti sian privatan profiton, Huang Gjun, Pan Ĉang-ju, Liu Ŝinian, Liaŭ Ĝili k.a. bandiĝis kaj faris, en koluzio, multe da kontraŭleĝaj aferoj. Informiĝinte pri tio, ke Hiaŭ Juĝu k.a. malkaŝis ilin per letero, ili kovis en koro malamon kontraŭ ŝi. Nelonge post kiam Ŝi Buhua helpis Hiaŭ Juĝu k.a. en skribo de letero, li raportis tion al siaj gvidantoj. Kaj Huang Gjun, Liu Ŝinian k.a. kulpigis Hiaŭ Juĝu pri “kalumnia denunco kontraŭ revoluciaj kadroj,” kaj tiel kruele turmentis ŝin por sin venĝi ke ŝi kripliĝis kaj eĉ iras tre malfacile.

Skribi al gvidanta instanco por malkaŝi kontraŭleĝan agon ja estas fundamenta rajto de civitano. Sed, Hiaŭ Juĝu suferis pro tio venĝeman persekuton, tio estas absolute netolerebla por la partia disciplino kaj ŝtata leĝo. Tial la plendo de Hiaŭ Juĝu vekis atenton de gvidantoj de la provinca komitato de la Partio. Por protekti la demokratian rajton de la popolo malkaŝi

*Liberigite, K-dino Hiaŭ Juĝu (la dua de maldekstre) energie helpas junajn aktorinojn en ekzerco.*



fiulojn kaj malbonajn aferojn kaj rigore observigi la leĝon kaj disciplinon, la provinca komitato de la Partio organizis enketan grupon kiu tuj iris al bazaj unuoj por esplori kaj solvi la problemon.

La kontraŭleĝaj agoj de Huang Gjun, Pan Ĉang-ju, Liu Sinian k.a. antaŭlonge jam vekis malkontenton ĉe amasoj de la Kultura Buroo. En la 4-a de decembro, kiam la kuna enketa grupo de la provinca kaj urba komitatoj de KPC venis al la kultura buroo de la urbo Huajbej kaj la Jugju-opera Trupo, oficistoj kaj kulturaj laborantoj vigle tion komentis kaj diskutis kaj multaj diris ĝoje, ke la kultura buroo kaj la Jugju-opera Trupo havos bonan perspektivon, nemalmultaj homoj aktive prezentis problemojn al la enketa grupo kun la espero ĝisfunde solvi la problemon de la Kultura Buroo.

La enketa grupo unue aŭskultis raporton de Huang Gjun k.a. pri la t.n. problemo de Hiaŭ Juĝu kaj poste plendon de Hiaŭ Juĝu. Kaj post tio ĝi komencis fari profundan kaj zorgan enketadon per kolektado de opinioj de aliaj koncernaj homoj en kunsido kaj interparoloj.

La grupo multfoje interparolis kun Ŝi Buhua, sciigis lin ke skribi leteron al supera gvidanto por prezenti problemojn estas protektenda laŭ-

leĝa rajto de ĉiu civitano, ke la kadroj de la Partio kaj la ŝtato, en kia ajn rango, devas modele observi partian disciplinon kaj ŝtatan leĝon, konscie akcepti kritikon kaj kontroladon de amasoj kaj estas absolute malpermesataj subpremi demokration kaj fari venĝon. Ĝi petis ke Ŝi Buhua klarigu kun respondeco al la Partio kaj la kamaradoj la aferon de Hiaŭ Juĝu. Sub helpado de la enketa grupo, Ŝi Buhua fine sentimiĝis. Iutage li venis en la oficejon de la enketa grupo kaj diris: “Nun mi ekkomprenas, kaj mi sciigu al vi la fakton.” Kaj li rakontis la jenon:

Nelonge post skribo de la letero por Hiaŭ Juĝu k.a., gvidanto de la Agrikultura kaj Forstkultura Buroo pridemandis lin kien li lastatempe iris kaj kian kontraŭleĝan aferon li faris. Li estis ordonita bone pripensi! Li pensis, ke la skribado de la plenda letero por Hiaŭ Juĝu jam estis malkovrita de alia kaj ektimegis. Por eviti punon li rakontis falsan historion.

Tiamaniere, la enketa grupo finfine trovis klaran bildon de la afero post amasaj kunsidoj, multaj interparoloj kun koncernaj homoj.

Hiaŭ Juĝu estas malnova Jugju-opera aktorino, kiu ofte ludis historiajn tradiciajn operojn. Huang Gjun k.a. opiniis, ke ŝi apartenas al la



*Kamaradoj de la  
enketa grupo studas  
pri la kazo de Hiaŭ  
Juĝu.*

“nigra linio”, kaj intencis forpeli ŝin per persekutaj manovroj. La plenda letero de Hiaŭ Juĝu k.a. por malkaŝi la problemon de Huang Gjun, Liu Ŝinian k.a. rekte ofendis ilin. Tial kiam ili ricevis de Ŝi Buhua la falsan historion, ili tuj faris venĝon al Hiaŭ Juĝu. Ili kontraŭleĝe deklaris, ke Hiaŭ Juĝu devas esti izoligita por ekzamenado, kaj samtempe asignis Pan Ĉang-ju, Liu Ŝinian k.a. fari kontraŭleĝajn pridemandojn kaj fortan torturon al Hiaŭ Juĝu.

Post enketado kaj esplorado de pli ol monato, la enketa grupo deklaris al la oficistoj de la Kultura Buroo: La ĉefaj problemoj prezentitaj de Hiaŭ Juĝu per letero estis veraj sed ne kalumnio kontraŭ kadro; la ekzamenado en izoliteco kaj kontraŭleĝa torturado fare de Huang Gjun, Liu Ŝinian, Pan Ĉang-ju, Liaŭ Ĝili k.a. al Hiaŭ Juĝu estas venĝa persekuto kaj ili devas fari profundan penton; la oficistoj devas ilin helpi per kritikado kontraŭ iliaj eraroj.

Je la 1-a de februaro, 1978, post kritiko kaj helpo de amasoj, la Huajbej-a Komitato de KPĈ solene deklaris en mitingo, ke Hiaŭ Juĝu, suferinta venĝan persekuton, estas ĝisfunde liberigita kun restarigita bona reputacio, kaj tiuj, kiuj partoprenis en persekuto al Hiaŭ Juĝu, estos punitaj.

Interalie, en la movado de malkaŝo kaj kritiko kontraŭ la “kvarpersona bando”, Huang Gjun, kiel gvidanto de la Kultura Buroo, ne mobilizis amasojn al malkovrado kaj kritiko de krimoj de la “kvarpersona bando”, ne enketis nek traktis problemojn de Liu Ŝinian k.a., male persekutis Hiaŭ Juĝu, kiu prezentis misfarojn, ĉio ĉi tio jam plene perfidis la principon kaj starpunkton de gvidanta kadro, tial li estis senigita je liaj oficoj de estroj de la Kultura Buroo kaj la Jugju-opera Trupo. Liu Ŝinian nek konfesis nek pentis sian misagon, male aktive faris persekutajn paŝojn kontraŭ Hiaŭ Juĝu kaj kripligis ŝin, kaj krome post kritiko li ankoraŭ havis ekstreme malbonan sintenon, tial li estis eksigita el la Partio kaj transdonita al la policejo por puni laŭleĝe.

Puno al tiuj homoj ricevis varman subtenon de la amasoj.


Hiaŭ Juĝu speciale skribis leteron al gvidantoj de la provinca kaj urba komitatoj de KPĈ por danki la Centran Komitaton de KPĈ kun Prezidanto Hua kiel la ĉefo kaj gvidantojn de la provinca kaj urba komitatoj de KPĈ kaj la enketan grupon pro ilia dua liberigo al ŝi. Ŝi decidis lerni diligente post sia resaniĝo, solidare kunlabori kun la gekamaradoj kaj bone ludi operojn por vastaj amasoj kaj fariĝi proleta avangarda arta soldato.

# La Somera Palaco




Printempo venas al Kunming-lago

Ekskurso








Vanŝou-monto



Lotusfloroj de  
Hie kju ju an



Glazura pagodo  
en la dorsa flanko  
de Vanŝou-monto



La Deksep-spana  
Ponto



La konstruaĵo  
Baŭjunge (fronte)  
el 207 tunoj da  
latuno okcidente  
de Fohiang-turo



# Ĵrumateno de Pekino



de HIAŬ MEJ

**F**ĴRUMATENE, ĉu sur stratoj kaj placoj aŭ en parkoj de Pekino, ĉie viglas homoj sin ekzercantaj. Iuj kuras, aliaj gimnastikas kaj triaj skermas aŭ boksas. Plej kortuŝe estas ke eĉ multaj blankharaj maljunuloj tutjare persistas en sporta ekzerco.

Kiam mi venis al la strato Hidan, mi aŭdis la belan muzikon por gimnastika ekzerco. Dekoj da oficistoj kaj vendistoj de la butikoj de metalaĵoj estas farantaj gimnastikan ekzercon kun plezuro. En tiu aktivado ili persistadis jam ok jarojn. Iuj veteranaj vendistoj diris, ke en la malnova Ĉinio la komizoj devis labori por kapitalistoj de mateno ĝis vespero por akiri panon kaj tute ne havis ŝancon por sporta ekzerco. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, Prezidanto Maŭ alvokis por disvolvi sportajn aktivadojn kaj plifortigi la fizikan kvaliton de la popolo. Kaj ankaŭ la registaro kreis por la oficistoj kaj laboristoj favorajn kondiĉojn por sporta aktivado. Nun ĉiam pli multaj homoj de la butikoj partoprenas en sporto kaj faras gimnastikan ekzercon ĉiumatene.

En la lasta vintro, en Pekino oni faris simbolan kurkonkurson "Marŝo al Sciencoj". Ĉiu partoprenanto de ĝi devis kuri, en ĉiu tago, certan distancon kaj en la tuta vintro kuri la difinitan distancon, kio simbolis surgrimpon de altaĵo de sciencoj. Inter la 1,500,000 partoprenintoj, la

plejparto estis geknaboj kaj gejunuloj, kaj estis ankaŭ multaj viglaj maljunuloj.

Mi intervjuis pli-ol-60-jaran laboriston Vu Jimin. Li iam enhospitaliĝis pro angiektazio de siaj femuroj. Nun ĉiutage, li denove povas kuri 2,000 metrojn kiel antaŭe. Vu diris, ke li havas kelkajn maljunajn kunulojn en kurado, inter ili la plej maljuna estas 69-jara kaj la plej juna 54-jara, la meznombra aĝo de ili estas 59-jara. Post kiam ili interkoniĝis en ĉirkaŭurba kurkonkurso okazigita en la Printempa Festo, ili mem organizis sin en maljunulan grupon de longdistanca kuro. En tiu grupo estas oficistoj kaj laboristoj de fabrikoj, kontistoj de butikoj, ĉefkuracisto de interna medicino, instruistoj de elementaj lernejoj kaj redaktoroj de eldonejo. Ĉen Musen, reprezentanto de la Kvina Tutlanda Popola Kongreso kaj ĉefkuracisto de interna medicino estas Tajvan-provincano. Li nun estas en plezuro kaj plena je espero pri la brila estonteco de la socialisma patrolando. Ĉiumatene, li kuras 4,000 ĝis 5,000 metrojn. Presisto Ding Songsen estas elstara laboranto kaj ankaŭ la plej maljuna de tiu grupo. Li diris, ke li sin hardas korpe por fari pli multajn kontribuojn por la socialisma konstruado.

Kiam mi venis al Gongguancun en la okcidenta antaŭurbo de Pekino, mi vidis, ke multaj boksa-

das kaj skermadas. La 62-jara esploranto Je Duĝeng de la instituto de atmosfera fiziko faris absorbite tajĝiĉjuan-ekzercon. Kun forta amo al sia patrolando li revenis de Usono en la komenca periodo post la fondiĝo de la Popola Respubliko. Sed en la tagoj kiam la "kvarpersona bando" tiranis, la esplorado de sciencistoj estis limigita, pro kio ili malĝojiĝis kaj altiĝis lia sangpremo. Tuj post la falo de la "kvarpersona bando" la efektivigo de modernigo de agrikulturo, industrio, nacidefendo kaj tekniko kaj scienco havas grandan esperon. Ĉiutage li ellitiĝis tre frue kaj iris eksteren por boksa ekzerco. Dank' al tio, nun lia sangopremo malaltiĝis kaj stabiligis iom post iom. Krom tage li laboras ankaŭ nokte 2-3 horojn.

La ĉinaj boksaj ekzercoj estas multspecaj kaj tradiciaj sanigaj sportoj, el kiuj tajĝiĉjuan-o estas relative ĝenerala. Frumatene multaj mezaĝuloj kaj maljunuloj boksas absorbite en parko, ĉe rando de ŝoseo aŭ ĉe rivera bordo. Ĉar ili ofte renkontiĝas en boksado, ili fariĝas amikoj. Tuj memvole organizis sin en grupon. Ankaŭ la distrikta fizikokultura kaj sporta komisiono invitis spertajn boksistojn helpi al ili fondi stacion por


instrui la komencantojn. Nun en la tuta urbo troviĝas pli ol 90 tiaj stacioj, kaj pli ol 28,000 homoj partoprenas en tajĝiĉjuan-a ekzercado. Oni diris, ke tiu ekzerco evidente bone efikas por plibonigi la fizikan kvaliton. La Fizikokultura kaj Sporta Komisiono de Pekino faris ekzamenadon pri la sano de 734 boksantoj de 14 stacioj kaj trovis ke 634 el ili iam suferis 36 kronikajn malsanojn inkluzive de neŭrastenio, hipertensio, artrito kaj intesta kaj stomaka malsanoj. La sano de 93.2% de ili pliboniĝis dank' al unu-jara ekzercado kaj kuracado. 99 el tiuj, kiuj antaŭe tute aŭ duone ĉesis labori pro malsanoj, resaniĝis, kaj revenis al sia laborposteno. En printempo de la kuranta jaro, la Pekina Fizikokultura kaj Sporta Komisiono kaj la Urba Federacio de Sindikatoj kunvokis kunvenon kaj premiis 107 eminentajn instruistojn de 16 stacioj kaj diskonigis iliajn laŭdindajn farojn.

Kiam mi revenis per biciklo, la suno leviĝis kaj en matenruĝo rebrilis la tuta Pekino. Sur la larĝa ŝoseo, diversaj veturiloj kuris tien kaj reen senĉese, por porti la homojn al iliaj postenoj de laboro kaj lernado.

*En Tajĝiĉjuan-ekzercado*



*Gelaboristoj de la Ĉefurba Ŝtala kaj Fera Kompanio faras gimnastikon.*



# Vojaĝo al kvin okcidenteŭropaj landoj

**D**E la 2-a de majo ĝis la 6-a de junio, Gu Mu, vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko, vizitis Francion, Svision, Belgion, Danlandon kaj la Germanan Federacian Respublikon, akompanate de Kian Ĝengjing, ministrino de la Ministerio de Akvoutiligo kaj Elektropovo, Peng Min, vicedestro de la Ŝtata Konstrua Komisiono, Ĝang Genŝeng, vicministro de la Ministerio de Agrikulturo kaj Forstokulturo k. a. Dum tiu vojaĝo de pli ol 20,000 kilometroj, la ĉinaj gastoj estis solene kaj varme akceptataj de la registaroj kaj popoloj de la kvin landoj. Ĉe la aerodromoj, hoteloj kaj aliaj lokoj de pli ol 20 urboj vizititaj de la ĉinoj, flirtis la kvinstela ruĝa flago de la Ĉina Popola Respubliko, kaj ĉie kien ili venis, ili estis varme salutataj per mansvingado.

## La popoloj kaj amikeco

Dum nia vizito al la kvin okcidenteŭropaj landoj, oni ofte demandis al ni, kio plej profunde nin impresis. Ni opiniis, ke la plej profundan impreson donis al ni la diligentaj kaj saĝaj popoloj de tiuj landoj kaj iliaj amikaj sentoj al la ĉina popolo.

Vicĉefministro Gu Mu kaj la kunvizitantoj pasigis gajan dimanĉon en paŝtejo je 150 kilometroj fore de Marsejlo, dum sia vizito al Francio. Kiam niaj aŭtoj alvenis tiun lokon, tieaj paŝtistoj en lokaj kostumoj kun larĝgrandaj ĉape-  
loj tuj rajdis al ni por nin bonvenigi. Grupo da knabinoj kun blankaj koltukoj kaj en buntaj jupoj ekdancis tradician popolan dancon. Iu paŝtisto alpelis bovon apenaŭ unu-jaran kaj

*Vicĉefministro Gu Mu  
pririgardas irigacian  
konstruaĵon akom-  
panate de la agrikul-  
tura ministro de Fran-  
cio.*





*Sur strato de Antverpeno de Belgio*



petis ke Vicĉefministro Gu Mu faru brulmarkon al ĝi laŭ loka kutimo kaj donu al ĝi nomon. Vicĉefministro Gu Mu do nomis ĝin "Amikeco". Sur la paŝtejo, la ĉinaj gastoj prenis abundan kamparan tagmanĝon, dum kiu ĉiuj taste trinkis la amikecon inter la ĉina kaj franca popoloj.

Dum vizito al la Hidroelektrejo de Bannwil en Svisio amatora ĥoro el la lokaj kamparanoj kaj laboristoj kantis plurajn popolajn kantojn por la ĉinaj gastoj. La potencaj kantoj resonadis de monto al monto, esprimante amon de la montanoj al sia hejmloko. En la mateno pluvis, kiam ni alvenis, la ĉielo jam sereniĝis. Ministrino Kian Ĝengjing diris sprite: "Vi elvokis la sunon per viaj kantoj." La ĉinaj gastoj manpremis kun la kantistoj kaj kune fotiĝis kun ili por memoro.

Kiam ni vespermanĝis en iu restoracio de Hamburgo post pririgardo de fabriko de aviadiloj nomataj "aeraj busoj" en la Germana Federacia Respubliko, dek kelkaj gelaboristoj de la aviadila fabriko kaj iu ŝipkonstruejo en najbareco venis en la restoracion por prezenti tradicion germanan popolan dancon por la ĉinaj gastoj. Post la prezentado, unu el la dancistoj diris al la ĉinaj gastoj: "Bonvolu transdoni la salutojn de nia Hamburga Popoldanca Grupo al la ĉinaj popolaj artistoj."

Kiam Vicĉefministro Gu Mu kaj aliaj vizitis la faman havenurbon de fiŝado kaj eksportado de agrikulturaj produktaĵoj Esbjerg ĉe la okcidenta marbordo de Danlando, la 25 konsilantoj de la urbo kolektiĝis antaŭ la urbodomo por bonve-

*Vizito al dentrada fabriko de Zuriko*



nigi ilin. La urbestro S-ro H. Rasmussen diris: "Vin bonvenigas ne nur ni, sed ankaŭ ĉiuj niaj 80,000 urbanoj, ĉar vi estas niaj tre bonaj amikoj kaj ĉio de Ĉinio interesas nian popolon." Kaj efektive tiel estas. Ĉu la irantoj sur stratoj, malŝarĝantaj laboristoj de la fiŝhaveno kaj biciklantaj gejunuloj aŭ infanoj ludantaj ĉe vojrandoj, ĉiuj mansvingante salutis al la ĉinaj gastoj, je ekrimarko de ili.

## Iom pri la industrio kaj agrikulturo de la kvin landoj

Vicĉefministro Gu Mu kaj la kunvizitantoj pririgardis en tiuj kvin landoj ĉefe entreprenojn de industrio kaj trafikado. Ni vidis multajn avangardajn objektojn de elektro, metalurgio, maŝinfarado, ŝoseoj, aerodromoj kaj havenoj. La progresintaj teknologioj kaj instalaĵoj estas kristaloj de diligenta laboro kaj saĝo de iliaj popoloj.

Koncerne al havenoj, ni vizitis la novan Foshavenon proksime de Marsejlo de Francio, la belgan Antverpeno-havenon, la danajn Kopenhago-havenon kaj Esbjerg-havenon kaj Bremer-havenon de la Germana Federacia Respubliko. La komunaj karakterizaĵoj de tiuj havenoj estas alta meĥaniziteco kaj mallonga restado de la ŝipoj ĉe la kajoj. Precipe la kontenerizita trafikado multe disvolviĝis en la lastaj jaroj. Havena administracio de Danlando diris, ke ĉiu argano povas enŝipigi 600 ĝis 700 tunojn da kargo al kontenerŝipo en ĉiu horo, dum ĉiu skipo de laboristoj


povas enŝipigi ĉiuhore nur 45 tunojn da kargo al ordinara kargoŝipo. Kompreneble, altigo de la ŝarĝa kaj malŝarĝa laborproduktivo postulas ankaŭ kunagon de bona transporta reto de ŝoseoj, fervojoj kaj enlandaj akvovojoj.

Ĉifoje ni rigardis relative multajn elektrejojn, inkluzive de termoelektrejoj de GFR, Belgio kaj Danlando, hidroelektrejoj de Svisio kaj Francio kaj nukleaj elektrejoj de Francio, GFR kaj Belgio. La totala kapacito de la elektrejo de Eindersausen de GFR estas 2,700,000 kilovattoj. Tiu termoelektrejo estas la plej granda en Eŭropo. Ĝia hejtajo estas lignito alportita per bendtransportilo de liberĉiela karbominejo je 5 kilometroj fore. Svisio efektivigis plenan utiligon al siaj akvofortaj riĉfontoj. Ni pririgardis la hidroelektrejojn sur Aare-rivero, kiu fontas en la Alpoj. Sur tiu rivero kun longeco de nur 300 kilometroj troviĝas multaj hidroelektrejoj, kaj sole sur la supra parto kun longeco de pli ol 30 kilometroj kaj ĝiaj branĉoj jam konstruiĝis 8 hidroelektrejoj kun totala kapacito de 600,000 kilovattoj. La flukvanto de tiu rivero estas negranda, tamen dank' al racia reguligo, la akvoforto de ĝi estas plene ekspluatata. En Francio, ni pririgardis la nuklean elektrejon de Bugey. Krom premakvajn reaktorojn, kiuj estas vaste aplikataj en la mondo, Francio ankaŭ sukcese konstruis pli progresintan rapidgeneran reaktoron.

Dum la vizitado, ni ricevis relative profundan impreson pri vasta apliko de komputeroj en la fabrikoj kaj entreprenoj de okcidenta Eŭropo. Ĉe la aerodromo Charles de Gaulle en ĉirkaŭaĵo de Parizo, oni direktas la flugon kaj alteriĝon de aviadiloj per komputero. Ĉe Bremer-haveno de GFR, la enporto, tenado kaj elporto de konteneroj estas spegulataj tute per komputero. La hidroelektrejo de Bannwil kun kapacito de 25,000 kilovattoj en la malsupra baseno de Aare-rivero de Svisio estas regata tute per komputero kaj neniu homo deĵoras ĉe ĝi en ferioj. Tiu hidroelektrejo havas nur 12 laborantojn, kiuj zorgas pri ekzamenado kaj riparado de la ekipaĵoj. En Belgio, ni vizitis aŭtomatan zink-fabrikon, kies kemia reakciado estas regata per komputero.

*Vizito al la Germana Esplora Centro de Elektrona Sinkrotrono en Hamburgo*





*Danaj gejunuloj bonvenigas la ĉinajn gastojn.*

### Ĉiam en alarmo

La landoj de okcidenta Eŭropo, kiuj estis kruele tretitaj de faŝistoj dum la Dua Mondmilito, bone restariĝis kaj multe disvolviĝis. Sed hodiaŭ ili denove vizaĝas al serioza minaco de unu superpotenco.

Dum sia vizitado al okcidenta Eŭropo, Vicĉefministro Gu Mu montris foje kaj refoje: Estas tute kompreneble, ke la eŭropa popolo, kiu suferis dolorojn en la du mondmilitoj, sopiras pacon. Sed bonkora deziro ne povas anstataŭi la rigoran fakton. La fakto alfrontata de la popoloj estas, ke pli kaj pli akriĝas la batalo inter la superpotencoj por monda hegemonio tiel ke la popoloj ne povas vivi trankvile. La popoloj de ĉiuj landoj devas bone sin prepari kontraŭ agresa milito kaj unuiĝi por firme batali kontraŭ hegemoniismo.

Hodiaŭ en okcidenta Eŭropo pli kaj pli multaj homoj jam vidas de kie venas la minaco al paco kaj oni devas ĉiam sin gardi kontraŭ agresantoj.

En Kopenhago de Danlando, ni vizitis muzeon, kiu speciale prezentas al la vizitantoj, kiel Hitler komencis la Duan Mondmiliton kaj kiel la dana popolo batalis kontraŭ la germana okupanta armeo. Iuj historiaj fotoj montrataj en la muzeo estas pripensigaj. Unu el ili prezentas la subskribadon de la Munkena Interkonsento je la

29-a de septembro de 1938. Laŭ tiu interkonsento, parto de Ĉeĥoslovakio estis aneksita al Germanio, tamen tio ne povis malhelpi la eksplodon de la milito. Alia foto prezentas germanan armeon transpasantan la landlimon de Pollando en la 1-a de septembro de 1939, kio signas la eksplodon de la Dua Mondmilito. Tria foto montras, ke germana trupo invadas en Kopenhagon en la 9-a de aprilo, 1940, kaj de tiam Danlando estis okupata por 5 jaroj. Sed la popolo faris rezolutan reziston kontraŭ la agresantoj. Antaŭ la pordego de la muzeo, ni vidis kirasitan aŭton faritan siatempe de laboristoj de fervoja fabriko, kaj per tiu aŭto gerilanoj faris heroan bataladon kontraŭ naziistoj en la 5-a de majo, 1945.

La historia leciono edukis la homojn. Ankaŭ Svisio, kiu restis neŭtrala en la du mondmilitoj, nun konsideras pri la minaco de milito. Kiam ni vizitis dentradan kompanion de Zuriko, respondeculo de la fabriko kondukis nin al kontraŭaerataka tunelo je 10 metroj sub la fabrikaj domoj. Tiu tunelo estas kovrita per betona tavolo kun dikeco de unu metro. Nun la tunelo estas malplena, sed en 24 horoj oni povas ĝin provizi per akvo, elektro, kuracaj necesajoj, kuiraj kaj lavadaj bezonajoj ktp. Svisa civitano de pli-ol-20-jara aĝo devas plenumi militistan servon, kaj poste akcepti, en malsamaj periodoj laŭ diferencaj aĝoj, "relernan trejnadon" kaj ekmobiliziĝi en eventuala bezono.

Inter Ĉinio kaj la landoj de okcidenta Eŭropo estas longega distanco, kaj malsamaj estas la sociaj sistemoj, tamen la komuna batalo kontraŭ hegemoniismo kunligis Ĉinion en la Oriento kaj la landojn sur la kontinento de okcidenta Eŭropo. Por efektiviĝi modernigon de niaj agrikulturo, industrio, scienco kaj tekniko kaj nacidefendo, ni devas ĉefe nin apogi sur propraj fortoj, tamen samtempe ni ankaŭ devas modeste lerni avangardajn spertojn de fremdaj landoj. Multaj el la renkontitaj fremdlandaj amikoj laŭdis la laborem kaj kuraĝecon de la ĉina popolo kaj esprimis sian bonan deziron, ke Ĉinio frue efektivigu la kvar modernigojn, kaj sian volon pliintensigi la interfluan de ekonomio, scienco kaj tekniko kun Ĉinio.

# Pri ekstera komerco de Ĉinio

**L**ASTATEMPE Li Kiang, ministro de ekstera komerco de nia lando, akceptis ĵurnalistojn de la gazeto «Ekstera Komerco de Ĉinio» kaj respondis al ili demandojn pri la situacio kaj politikoj de nia ekstera komerco.

Retrorigardinte la bonegan situacion de nia lando aperintan post la faligo de la “kvarpersona bando”, Ministro Li Kiang montris, ke por plenumi la aferon postlasitan de Prezidanto Maŭ Zedong kaj Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj, konstrui nian landon en grandan socialisman modernan poten-

con en la kuranta jarcento, la laborantoj de nia ekstera komerco devas energie labori kaj fari sian kontribuon por akceli la disvolviĝon de nia nacia ekonomio, efektivigante la revolucionan diplomatian linion de Prezidanto Maŭ. Li diris, ke kun disvolviĝo de la nacia ekonomio kaj niaj internaciaj kontaktoj la ekstera komerco de nia lando nepre havos grandan disvolviĝon, plene elvolvante la aktivecon de koncernaj departementoj kaj lokaj instancoj laŭ la unueca plano de la ŝtato.



*Ministro Li Kiang*

Li diris plie, ke la perspektivo de la komerco inter nia lando kaj la amikaj landoj de la tria mondo estas vasta. En la lastaj jaroj multaj landoj de la tria mondo petis de nia lando liveron de instrumentoj, ilmaŝinoj, konstruaj metalaĵoj kaj aliaj ekipaĵoj. Ni ja devas kaj ankaŭ povas pli multe produkti kaj eksporti tiajn varojn. Ni ankaŭ ĉiam pliigas la specojn de varoj importitaj el tiuj landoj. Krom agrikulturajn kaj brutajn produktaĵojn kaj ercon ni pliigos laŭeble la importan kvanton de teksaĵoj, industriaj vivbezonaĵoj, kemiaĵoj, maŝinoj, ŝtalaj materialoj ktp.

Parolante pri sia vizito al Britio, Francio, Belgio, Luksemburgo kaj Okcidenta Germanio en la lasta kaj kuranta jaroj kaj pri lia subskribo de la negoca interkonsento, en la nomo de nia registaro, kun la Eŭropa Ekonomia Komunumo, Li Kiang montris, ke liaj vizitoj kaj interparoloj estas fruktodonaj. Menciante pri tio, li emfazis, ke por modernigi nian landon la avangardaj teknikoj kaj spertoj de la okcidenteŭropaj landoj en industria kaj agrikultura produktado estas lernindaj por ni. Li diris, ke kun disvolviĝo de nia ekonomio plivastiĝos paŝon post paŝo la ekonomia kaj teknika interŝanĝo inter ni kaj tiuj landoj, kaj la perspektivo de negoco estas sufiĉe vasta.

Pri la longtempa komerca interkonsento inter Ĉinio kaj Japanio, Li Kiang montris: Ĝi estas la unua longtempa popola komerca interkonsento (1978-1985), subskribita laŭ la spirito de la Komuna Deklaracio kaj la Komerca Kontrakto de la Ĉina kaj Japana Registaroj. En la valida tempo de la interkonsento la totala valoro de eksportaj varoj de ĉiu flanko atingos ĉ. dek miliardojn da usonaj dolaroj. La interkonsento estos plenumita subtenate de la ĉina kaj japana registaroj. Ĝi ne nur ebligos jaro-post-jaran pliigon de la ĉefaj importaj kaj eksportaj varoj sur la bazo de longtempa kaj stabila liverado en la negoco inter la du landoj, sed ankaŭ havos grandan signifon en plivastigo de ekonomia kaj teknika interfluo kaj pliigo de amikeco de la du popoloj. Li montris ankaŭ, ke tiu interkonsento konsistigas nur parton de la tuta komerco inter Ĉinio kaj Japanio, kaj la negoco de aliaj varoj daŭre disvolviĝos inter la du landoj.

Ministro Li Kiang ankaŭ koncize klarigis niajn nunajn politikojn pri eksporto kaj importo kaj niajn agmanierojn en negocado. Li diris: Eksterlandaj amikoj diris, ke niaj eksportaj-importaj kompanioj aplikas pli flekseblajn manierojn en la nuna negocado. Fakte, tiuj kompanioj nur restarigis aŭ aplikis iujn kutimajn manierojn en la internacia negoco. Ekz., tiuj kompanioj konsentis akcepti mendon de eksterlandaj komercistoj laŭ iliaj specimenoj kaj mendon de varoj kun marko difinita de la mendantoj, fari varojn el krudaj materialoj liverataj de la mendantoj kaj akcepti mendon de maŝinpartoj, maŝinpecoj kaj ilaroj faritan de eksterlandaj komercistoj por iliaj maŝinoj, akcepti diversajn formojn de pago laŭ konkretaj kondiĉoj, paŝon post paŝo fari vendon de varoj en alilandaj ekspozicioj kaj komisiitan vendon. Ili ĉiam volas racie reguligi prezojn de niaj eksportataj varoj laŭ la ŝanĝiĝo de prezoj de la internacia merkato. Ĉiuj ĉi tiuj negocaj manieroj estas vaste aplikataj de diversaj landoj de la mondo. Krome, tiuj kompanioj donas aktivan konsideron al proponoj prezentitaj de eksterlandaj klientoj pri apliko de aliaj flekseblaj negocaj manieroj. Pri la politikoj kaj agmanieroj en niaj eksportado kaj importado la ministro montris, ke en la lastaj jaroj, laŭ la bezonoj de la socialisma konstruado, nia lando laŭplane importis elektitajn kompletajn ekipaĵojn de kemisterko, kemifibro, laminato, elektro kaj iujn patentitajn teknologiojn. Tio havas pozitivan signifon por plirapidigi la paŝojn de disvolvo de niaj industrio kaj agrikulturo kaj por plifortigi nian memstaran kapablon. En la estonteco ni daŭrigos tiun faron.

En la fino Ministro Li Kiang diris, ke nia principo de konstruado estas memstareco kaj sinapogo sur propraj fortoj. La monrimedoj por konstruado devenas de nia propra akumulado. Sur la bazo de disvolvo de eksportado ni pliigas la importan kvanton de varoj. Pro tio, importi ĉu kompletajn ekipaĵojn aŭ patentitajn teknologiojn, ĉio ĉi tio devas esti bazita sur nia paga kapablo nuna kaj estonta, ĉu en formoj de konstanta pagoj, amortizo kaj longtempa postpago, aŭ en la formoj de pago per produktaĵoj kaj de aliaj kutimaj pagformoj aplikataj en la internacia negoco.





# Edgar Snow—fidela amiko de la ĉina popolo

(Daŭrigo)

## Reveno al Ĉinio post 19 jaroj

La 1-an de oktobro, 1949, Prezidanto Maŭ Zedong solene deklaris, sur Tian-anmen-pordego, la naskiĝon de la nova Ĉinio. Forpasis por ĉiam la kruele mistraktata malluma malnova Ĉinio, kiun abomenis E. Snow. Li akklamis la grandan venkon akiritan de la ĉina popolo en la revolucia batalo kaj arde deziris reviziti la novan Ĉinion liberigitan.

Sed pro tio, ke E. Snow simpatiis al la ĉina revolucio kaj havis amikan senton al la ĉina popolo, li estis persekutata de MacCarthy-ismo en Usono en la kvindekaj jaroj kaj tie apenaŭ troviĝis gazetoj kaj ĵurnaloj kiuj kuraĝis aperigi liajn artikolojn, tial E. Snow devis transloĝiĝi al Svisio kun sia familio.

En junio de 1960, E. Snow revenis finfine al Ĉinio ne vidita dum 19 jaroj, post multaj klopodoj. Kaj poste, li denove vizitis ĝin en 1964 kaj 1970. Okaze de liaj tri vizitoj, Prezidanto Maŭ kaj Ĉefministro Ĝoŭ intime intervidiĝis kun li, lin gastigis en sia hejmo kaj rakontis al li pri la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de Ĉinio, kio tre ĝojigis kaj kortuŝis E. Snow.

Dum siaj vizitoj al Ĉinio, E. Snow pririgardis vilaĝojn kaj fabrikojn kaj vizitis revoluciajn sanktejojn kun granda intereso. Li deziris detale observi la grandajn ŝanĝojn okazigitajn en reformado de Ĉinio fare de la “okcent milionoj da Malsaĝaj Avoj” sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio, farante komparojn per si mem. En aŭgusto de 1970, E. Snow

venis al la malproksima Ĝidan-gubernio (antaŭe Baŭ-an-gubernio). En 1936, kiam la Ruĝa Armeo alvenis tien, E. Snow vidis tie nur mizerecon. Sed nun, vizaĝe al la prospera Ĝidan-gubernio, li ne plu povas rekoni la antaŭan lokon. Li diris al la akompananta ĉina kamarado kun profunda emocio: “Mi tute ne atendis, ke tiel granda ŝanĝo okazis ankaŭ al tiel malfacile trafikebla loko en nordokcidenta Ĉinio.”

En la 4-a de oktobro, 1975, okazis en la Popola Halo ceremonio de transdonado de donacajo: Sinjorino Snow propramane donis al Vicprezidantino Deng Jingĉaŭ ruĝarmean kepon, kiun iam Prezidanto Maŭ portis surkape. Tiu grize blua kepo kun brile ruĝa stelo estis al li donacita de la Ruĝa Armeo, kiam li vizitis nordan Ŝenhi en 1936. Iutage, E. Snow fotis Prezidanton Maŭ antaŭ la pordo de lia kaverndomo. Ĉar Prezidanto Maŭ tiam ne portis kepon, li do transprenis kaj surmetis al si la kepon de E. Snow kaj poste lasis lin foti. Kaj tiel naskiĝis la valorega foto “Prezidanto Maŭ en Norda Ŝenhi”. Poste, kun tiu kepo E. Snow iris de loko al loko trapenetrante la blokadajn liniojn de Kuomintang kaj la japana imperiismo. Kiam li komenkis trankvilan vivon, li farigis por la kepo delikatan skatolon, dank’ al kiu la kepo estis konservita en bona stato. Estas imageble, kiom da profunda kaj sincera amo al Prezidanto Maŭ kaj la ĉina popolo E. Snow verŝis en tiun ruĝarmean kepon kun speciala signifo! Dum tiuj vizitoj, Sinjoro E. Snow donacis al la Muzeo de la Ĉina Revolucio valorajn historiajn objektojn, kiujn li konservadis dum multaj jaroj kaj transportis



Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj lia edzino K-dino Deng Jing-ĉaŭ akompanas S-ron E. Snow en vizitado al la Akvokonservejo de la Dektri Maŭzoleoj.

milojn kaj milojn da kilometroj — unu filmon kaj grandan nombron da fotoj kaj negativoj fari-taj de li en 1936 kaj 1939 pri la batala vivo de Prezidanto Maŭ, Vicprezidanto Ĝoŭ, Ĉefkoman-danto Ĝu De kaj aliaj gvidantoj de nia lando kaj la armeo kaj popolo en la revolucia bazloko.

### Por la amikeco inter la ĉina kaj usona popoloj

Pro bone konata kialo, la rilato inter Ĉinio kaj Usono dum longe estis en nenormala stato kaj la amika kontaktado inter la ĉina kaj usona popo- loj interrompiĝis dum pli ol 20 jaroj. Sed E. Snow firme kredis, ke la nuboj super Pacifiko, kiu interligas Ĉinion kaj Usonon, estos forpelitaj finfine, kaj certe alvenos printempo de la amika kontakto inter la ĉina kaj usona popoloj.

Por akceli la interkomprenon inter la ĉina kaj usona popoloj, E. Snow aktive kolektis informojn pri la nova Ĉinio, utiligante la favoran kondiĉon de sia longa studado pri la ĉinaj problemoj kaj la ŝancon de siaj pluraj vizitoj al Ĉinio kaj entu- ziasme prezentis, per verkoj, prelegoj, paroladoj, leteroj kaj interparoloj, al la usona popolo la revolucion batalon kaj sukcesojn de la ĉina popolo en konstruado, sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la komunista Partio de Ĉinio.

E. Snow estis serioza kaj diskreta, kaj persistis en honesta raportado pri Ĉinio laŭ siaj vidaĵoj. En 1970, li komencis unu el siaj gravaj verkoj “Longa Revolucio”, por plene prezenti la tutan procezon de la ĉina revolucio. Sed antaŭ ol li finis tiun verkon, li estis devigita ĉesigi la ver- kadon pro subita grava kancero. En tiu tempo,

S-ino Snow plurfoje petis de li konsenton pri antaŭtempa eldono de tiu libro laŭ la stato de lia malsano, sed li ne konsentis. Nur antaŭvespere de lia forpaso, kiam li jam sciis, ke li ne plu povos daŭrigi la verkadon, li konsentis, post multfoja admono, ordigi kaj eldoni la libron. Kiam tiu verko aperis en Usono, la aŭtoro jam forpasis.

La vizito de E. Snow en 1970 estis alia neforgesebla "Vojaĝo al Norda Ŝenhi": nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ faris longan kaj tre gravan interparolon kun li en sia hejmo en Ĝongnanhaj. Post sia reveno, li verkis 7 artikolojn inkluzive de "Mi Interparolis kun Maŭ Zedong" kaj "Mia Interparolo kun Ĝoŭ Enlaj", per kiuj li raportis laŭfakte al la mondo la enhavon de la paroloj de Prezidanto Maŭ kaj Ĉefministro Ĝoŭ, prezentis la grandan kulturen revolucion kaj aliajn aferojn de Ĉinio kaj donis gravan informon pri tio, ke la rilato inter Ĉinio kaj Usono disvolviĝos grandpaŝe, ĉio ĉi tio ludis tre bonan rolon en pliapaŝa disvolvado de la amikeco inter la ĉina kaj usona popoloj.

Vizaĝe al la bonega situacio de tagon-post-taga disvolvado de la rilato inter Ĉinio kaj Usono kaj la amikeco inter la popoloj de la du landoj, kiel ĝojis E. Snow, kiu klopodadis por tio dum pli ol duono de sia vivo! Precipe en tiu tempo, multaj usonanoj, kiuj estis pretaj viziti Ĉinion, veturis al Svisio por lin viziti aŭ skribis al li por peti, ke li prezentu al ili la novan Ĉinion. Ĉio tio ege kuraĝigis kaj konsolis E. Snow en malsano. Kuŝante sur lito, li parolis aŭ diktadis por laŭeble helpi la usonajn gastojn. Eĉ en la lastaj tagoj de sia vivo, li ankoraŭ pensadis pri la amikeco inter la ĉina kaj usona popoloj. Ĉiufoje kiam li vekigis el sveno, la unua afero en lia zorgo estis legi ĵurnalon, precipe legi novaĵojn kaj artikolojn pri la interrilato inter Ĉinio kaj Usono. Fine, li eĉ jam ne povis mem legi ĵurnalon, kaj tiam li lasis sian infanon legi por li.


### **Li ĉiam vivos en la koro de la ĉina popolo**

En vintro de 1971, oni trovis, ke E. Snow suferas kanceron kaj tuj donis al li operacion.

Prezidanto Maŭ kaj Ĉefministro Ĝoŭ tre zorgis lian sanon. En tiu tempo, la ĉina reprezentanto al UNO Huang Hua kaj la ĉina ambasadoro al Svisio Ĉen Ĝifang plurfoje iris al lia hejmo por lin vidi kaj saluti. Foje informiginte, ke ambasadoro Ĉen Ĝifang alportis konsolan leteron de Ĉefministro Ĝoŭ, li ege kortuŝigis, kaj malgraŭ forta dolorego descendis de sia etaĝo, sub helpo de sia filo, varme ĉirkaŭbrakumis la ambasadoron kaj foje-refoje esprimis siajn dankojn al la ĉina gvidanto.

Kiam la kancero de E. Snow estis malkovrita, ĝi jam troviĝis en la malfrua periodo, kaj post la operacio kanceraj ĉeloj plue disvastiĝis kaj samtempe estiĝis alia malsano. Tre serioza estis la stato. Pro tio, nia registaro sendis kuracan grupon konsistantan el kuracisto George Hatem, kiu estas amiko de S-ro E. Snow, aliaj kuracistoj, flegistoj kaj interpretisto, al Svisio por doni helpon en kuracado kaj flegado. Kun profunda amo al E. Snow, la kuraca grupo turnis lian dormoĉambron en hejman malsanuloĉambron, faris zorgan ekzamenon pri lia sano kaj kuracadon, kaj tage kaj nokte bone lin flegadis. Por plifortigi la kuracan grupon, membroj de la ĉina kuraca grupo en Alĝerio eĉ dufoje alvenis por helpo.

*Ges-roj Snow interparolas kun emeritaj ruĝarmeanoj en Ĝidan-gubernio.*



Frumatene de la 15-a de februaro, 1972, E. Snow, fidela amiko de la ĉina popolo, ĉesis spiri en sia hejmo, pro malboniĝo de sia malsano. Li forpasis en sia 67-jara aĝo.

La granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ montris senliman funebtron pri la forpaso de E. Snow kaj montris en sia kondolenca telegramo al S-ino Snow: "Sinjoro E. Snow estas amiko de la ĉina popolo. Li faris senlaca klopodadon, dum sia vivo, kaj faris gravan kontribuon por pliigi la interkomprenon kaj amikecon inter la ĉina kaj usona popoloj. Li vivos por ĉiam en la koro de la ĉina popolo." Ankaŭ Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj Viceprezidantino Song Kingling sendis respektive kondolencajn telegramojn al S-ino Snow por esprimi profundan funebtron pri la forpaso de E. Snow kaj koran konsolon al liaj familianoj.

E. Snow, kiu ĉiam havis profundan amon al la ĉina popolo, postlasis sur paperslipo jenajn kortuŝajn lastajn vortojn: "Mi amegas Ĉinion. Mi volas, ke parto de mi estu restigita tie post mia morto, kiel dum mia vivo. Kaj mi volas, ke la alia parto de mi estu ŝutita en Hudson-riveron en Usono — la patrio kie mi naskiĝis." Laŭ la testamento de E. Snow, duono de lia cindro jam estis enterigita, en oktobro de 1973, ĉe la pito-

reska Vejming-lago de la Pekina Universitato, kie antaŭe estis Janging-universitato en kiu li instruadis dum sia vivo. Nia amata Ĉefministro Ĝoŭ ĉeestis la enterigan ceremonion. De tiam, antaŭ la tomboŝtono kun jenaj vortoj ĉizitaj en la ĉina kaj angla lingvoj "Tombo de amiko de la ĉina popolo usonano Edgar Snow" ĉe Vejming-lago kun ĉiamverdaj pinoj kaj cipresoj ĉirkaŭe, postlasiĝis piedsignoj de miloj kaj miloj da ĉinaj popolanoj kaj fremdlandaj amikoj alvenantaj al tiu loko kun karmemoro al E. Snow.

La usona popolo estas granda popolo. La malproksimen-vida S-ro E. Snow estas unu el la milionoj da ordinaraj usonaj popolanoj justamaj. Tiel en la longa ŝtorma nokto de malnova Ĉinio kiel en la sunbrila socialisma hodiaŭo, S-ro E. Snow ĉiam traktis la ĉinan popolon kaj la amikecan aferon inter la ĉina kaj usona popoloj, kun justema, malkaŝema kaj varma koro senŝanĝa dum dekoj da jaroj. En la historio de amikeco inter la ĉina kaj usona popoloj, la amika interrilato de S-ro E. Snow kun Ĉinio dum jardekoj formis laŭdindan kaj tre kortuŝan ĉapitron.

Edgar Snow vivos por ĉiam en la koro de la ĉina popolo!

(Fino)



*Tombo de Edgar Snow en la korto de la Pekina Universitato*



### LA LABORISTA SANATORIO DE LA OKCIDENTA LAGO DENOVE MALFERMITA

La laborista sanatorio ĉe la bordo de la fame konata pitoreska Okcidenta Lago de Hangĝou antaŭ ne longe akceptis pli ol 120 labormodelojn kaj avangardajn laborantojn el industria, trafika, financa kaj negoca branĉoj de Ĝegiang-provinco. Tie ili ne nur ĝuas senpagan kuracadon, sed ankaŭ povas ricevi sian tutan salajron en la kuracada periodo.

En la pasinteco, la sanatorio funkciigata de la Ĝenerala Sindikato de Ĝegiang-provinco ĉiujare akceptis multajn laboristojn. Sed pro ĝenoj kaj subfosado de la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Lin Biau kaj la "kvarpersona bando", la sanatorio ĉesis akcepti laboristojn dum 12 jaroj.

La dirita sanatorio daŭre akceptos laboristojn por senpaga kuracado kaj ripozado en la estonto.

### LA UNUA TURISMA LERNEJO DE NIA LANDO

Por kulturi servistojn por turisma afero Ĉinio starigis sian unuan turisman lernejon en la urbeto Hufu de Jihing-gubernio de Giangsu-provinco.

Nun, la lernejo varbis 468 lernantojn kun klereco de mezlernejo, por ke ili lernu en tri fakoj de servado, kuirado kaj stirado de aŭtomobilo. Krom fakaj sciigoj kaj teknikoj, la lernantoj lernas ankaŭ ĉinan kaj fremdlandan historiojn, geografion, politikon, la ĉinan, anglan kaj japanan lingvojn. Post lernado de du jaroj, ili laboros en hoteloj kaj restoracioj por turistoj.

### EMINENTAJ FREMDLANDAJ FILMOJ EN ĈINIO

Lastatempe nia lando projekciis plurajn fremdlandajn eminentajn filmojn. Interalie sin trovis jugoslavaj rakontaj filmoj "En 67 Tagoj", "Valter Defendas Sarajevon" kaj "Ponto" pri batalo de la jugoslava popolo kontraŭ faŝista agreso. Ili respegulas, de malsamaj flankoj, la grandajn meritojn faritajn de la jugoslava popolo sub la gvido de Marŝalo Tito en la kontraŭfaŝista milito.

La rumaniaj filmistoj spegulis sur ekranoj la historion de siaj praavoj, "Dacia" en batalo kontraŭ la agreso de la Romana Imperio, la meritojn de "Duko Mihai" kiu la unua unuigis Rumanion en la lastaj jaroj

de la 16-a jarcento kaj la revolucion vivon de "Ciprian Porumbescu", la rumana patriota komponisto de la 19-a jarcento. Post rigardo de la filmoj, la ĉinaj rigardantoj havas plian respekton al la rumana nacio amanta sendependecon kaj liberon. Krome oni projekciis ĉeĥoslovakajn filmojn "Brava Soldato Svejk" (pupoj) kaj "Pli alta Principo" kaj hungaran filmon "Anserobreda Knabo Matu", ankaŭ kiuj ricevis aprobon de geknaboj kaj gejunuloj.

### UNIVERSITATA ĤORO DE LA FILIPINOJ EN ĈINIO

La prezentado de la Universitata Senakompana Ĥoro de la Filipinoj ricevis varman bonvenigon en Ĉinio. La nomita ĥoro konsistas el 24 studentoj, universitataj instruistoj kaj oficistoj. La kantistoj en naciaj kostumoj montris en sia sendirekta kaj senakompana kantado, unuecon de stilo, klarecon de nuancoj kaj harmonion de voĉoj. La folkloraj kantoj prezentitaj de ili havis fortan guston de ilia hejmloko kaj spegulis la vivon kaj saĝecon de la filipina popolo.



*Ulanfu kaj Vang Ĝen ĉeestas la koncerton de la Senakompana Ĥoro de Filipinaj Universitatoj.*

## VERKOJ DE JAPANA PENTRISTO EN PEKINO

Eminentaj verkoj de la fame konata japana pejzaĝa pentristo Kaji Higaŝijama kun nacia karakterizado kaj moderna stilo estis ekspoziciataj en Pekino kaj ricevis laŭdojn de ĉinaj artistoj kaj popoloj.

La ekspozicio enhavis 150 pentraĵojn, kiuj dividiĝis en kvar partojn: 1. Liaj ĉefverkoj; 2. La verkoj faritaj dum lia vizito al Ĉinio en 1976-1977; 3. Freskoi; 4. Verkoj pri pejzaĝoj de la kvar sezonoj de Kioto, Japanio.



*Vicprezidanto Ulanfu kaj Seiji Ozava post la prezentado*



*“Blanka Ĉevalo” pentrita de Kaji Higaŝijama*

### SEIJI OZAVA RICEVIS APLAŬDON DE AŬSKULTANTOJ

En sia vizito al Ĉinio, la fame konata japana direktisto Seiji Ozava, direktis, en Pekino, la Simfonian Orkestron de la Centra Filharmonio de Ĉinio por pliigi la amikecon kaj interŝanĝi spertojn. En koncerto li direktis la ludadon de “La Dua Simfonio” de la germana komponisto Johannes Brahms,

“Uverturo de la Roma Karnavalo” de la franca komponisto Hector Berlioz, “Kanto de Lignohakistoj” de la japana komponisto Kijoŝige Kojama, la ĉina biva koncerto “Fratinetoj sur Stepo” kaj “Juna Nokto de ErkJuan” kunludita de kordaj instrumentoj de Ĉinio.

La direktado de Sinjoro Ozava super muzikaĵoj ĉu klasikaj aŭ modernaj montris lian apartan stilon. En ludado de “La Dua

Simfonio” de J. Brahms, li direktis kaj inspiris, per sia fajra entuziasmo kaj majstra direkta arto, la ludantojn profunde esprimi la internan belon de la komponaĵo. La prezentado ĝuste esprimis la klasikan stilon de la verko kaj satoriĝis je etoso de modernaj homoj, kaj plenis de printempa atmosfero kaj nuanco de kanto, tamen kun la strukturo strikta. Tio rikoltis varman aplaŭdon de la aŭskultantoj.

### LA ITALA FUTBALA TEAMO “INTER” DE MILANO

En la mezaj tagoj de junio, la itala futbala teamo “Inter” sub gvido de Ivanoe Flaizzoli, prezidanto de la futbala klubo “Inter” de Milano de Italio, venis al nia lando por fari amikan konkurson. Ĝi egalas la ĉinan teamon per 1 : 1 kaj malgajnis en konkurso kun la pekina teamo per 0 : 1. En la du konkursoj, la dulandaj sportistoj montris siajn bonajn stilon kaj ludarton kaj rikoltis varman laŭdon de 160,000 pekinaj spektatoroj.

# *Kanta de la juneca*

(Elektitaj ĉapitroj de la romano)

(Daŭrigo)

**Resumo de la antaŭaj ĉapitroj:** *Laŭ instrukcio de la Partio, Lin Daŭging forlasis la oficejon de la regiona partia komitato kaj iris al la Pekina Universitato por mobilizi studentojn al la patriota nacisava movado. Sin nomante sekretario de la Bejping-a Komitato de Komunista Partio de Ĉinio, perfidulo Daj Ju, trompis Vang Hiaŭjan, studentinon de la Historia Fakultato de la Pekina Universitato kaj bonan amikinon de Lin Daŭging, ŝajnigante, ke li enamigis al ŝi, por plue damaĝi la partian organizon. Agitite de li, la sensperta Hiaŭjan subinstigis kelkajn reakciajn studentojn bati Lin Daŭging. Kaj pro tio rompiĝis la multjara intima rilato inter la du amikinoj. Sed iom post iom Hiaŭjan rimarkis suspektindaĵojn en la persona vivo de Daj Ju kaj ekvigligis sian gardemon. Foje insultite de sia superulo, Daj Ju forte ebriiĝis de drinkado kaj kuŝiĝis sur la lito de Hiaŭjan kaj endormiĝis. El lia poŝo Hiaŭjan trovis atestilon pri lia spioneco kaj nigran liston de progresemaj studentoj de diversaj lernejoj, sur kiu estis ankaŭ la nomo de Lin Daŭging. Sciinte la veron, la honesta Hiaŭjan tuj rapidis al la loĝejo de Lin Daŭging, dum Daj Ju estis ankoraŭ en dormado. Tie ŝi vidis Giang Hua, gvidanton de la Studenta Federacio de Bejping. Li jam fariĝis edzo de Lin Daŭging. Ili helpis*

*Hiaŭjan kaj ŝiajn gepatrojn fuĝi el la danĝero. La spioneco de Daj Ju malkovriĝis, kaj kiam li intencis ripari sian kulpon per ankoraŭ pli granda fiago, li estis mortigita de sia mastro.*

*Sub la gvidado de la Partio, la studentoj de Bejping okazigis grandiozan manifestacion en la 9-a de decembro de 1935, por postuli ĉesigon de la interna milito kaj unuaniman reziston kontraŭ la japanaj agresantoj.*

*Sub la gvidado de la Partio, la Studenta Federacio strikte unuigis grandajn nombrojn da aktivuloj, kiuj aperis en ĉiuj lernejoj post la manifestacio. Kaj dank' al tio rapide kreskis la fortoj de la Partio kaj la popolo. Por konduki ankoraŭ pli multe da popolanoj al la justa patriota vojo, la Partio decidis okazigi alian grandan manifestacion kun partopreno de altaj kaj mezaj lernejoj de la tuta urbo en la 16-a de decembro, la tago de oficiala fondiĝo de la Politika kaj Administra Komitato de Hebej kaj Ĉahar. Lin Daŭging aktive partoprenis en organizado kaj gvidado de la manifestacio de la Pekina Universitato. Ŝi pli kaj pli maturiĝis en la arda amasa movado.*

*Ĉisube estas la lasta duono de la fina ĉapitro de la romano.*

— LA Red.

Komence preskaŭ ĉiuj el la manifestaciantoj estis intelektuloj. Studentoj kaj mezlernejoj konsistigis pli ol 90% de la kelkdek mil partoprenantoj kaj la ceteraj estis instruistoj kaj oficistoj. Sed kun la pasia kriado de la amasoj, disflugado de flugfolioj kaj furiozado de glavoj kaj vipoj de la murdistoj, tiu kolono de la manifestaciantoj komencis ŝanĝiĝi. Oni ne scias kiam, laboristoj, kolportistoj, ŝtatifacistoj, rikŝistoj, ĵurnalistoj, junaj dommastrinoj kaj eĉ demobilizitaj soldatoj enviciĝis unuj post aliaj al la kolono. Ili prenis flagojn donitajn de la studentoj kaj senhezite ekiris kune kun la lastaj mano en mano, forgesinte personan danĝeron, kiel soldatoj marŝantaj al fronto.

Malforta Daŭging pene iris per ŝanceliĝaj paŝoj inter la manifestaciantoj de la Pekina Universitato.

Tiam pro senĉesa dispelado, parto de la studentoj de la Pekina Universitato perdis ligiĝon kaj malaperis Vang Hiaŭjan kaj Li Huaĵ-jing. Komunikantoj kaj disciplingardantoj klopodis por reordigi la kolonon. Post nelonga tempo la dispecigita kolono jam reordiĝis. Kvankam la homfluo iris malrapide, tamen ĉiam antaŭen plu.

Kiam la kolono de la Pekina Universitato atingis la pordon de la Ĝenerala Poŝtoŝtacio interne de Kianmen-pordego, la vizaĝo de Lin Daŭging subite ruĝiĝis kaj ŝi firme mordis sian lipon kaj kolere flamiĝis kvazaŭ ŝi volus sin ĵeti flanken al iu loko . . .

“Kio okazis al vi? Ĉu vi . . .” mire ŝin demandis iu studentino, kaptinte ŝin.

“Ne, nenio. Ni rapidu!” Daŭging iom sin kvietigis kaj denove ekmarŝis kun rideto sur la lipoj.

Efektive okazis al ŝi jeno:

Daŭging iris laŭ la maldekstra flanko de la strato. Kiam la kolono de manifestaciantoj de la Pekina Universitato iris al Kianmen-pordego preter la pordo de la Ĝenerala Poŝtoŝtacio, ŝian nervon ŝokis viro staranta sur la alta perono de poŝtoŝtacio. Ŝi klare rekonis, ke li estas Ju

Jongze, kiu senĝene parolas kun viro en luksa eŭropa kostumo. Kiam la severa rigardo de Daŭging renkontiĝis kun la paro da brilantaj okuletoj de Ju Jongze, ŝi trovis, ke li estas aprecanta la demonstracian kolonon kaj ŝian blue ŝvelintan vizaĝon kaj sangon el la naztruoĵoj. Ŝi do flamiĝis de indigno kaj koleriĝis tiel ke ŝi eĉ volus ĵetiĝi al li por lin insulti. Sed ŝi rapide kvietigis sin kaj sentis anstataŭe nur malestimon kaj malamon.

Preterpasinte Daĝalan de Kianmen, la manifestaciantoj de la Pekina Universitato renkontis tiujn de la Nordorienta Universitato, la Bejpinga Universitato, la Pedagogia Universitato, Hongda-mezlernejo kaj aliaj sume pli ol dek lernejoj. Ili kuniĝis huraante kaj plue iris suden. Post nelonge ili renkontis ankaŭ manifestaciantojn de Kinghua-universitato kaj Janging-universitato, kiuj venis en la urbon transgrimpinte la okcidentan urbomuron. La pasia ĝojkriado de la studentoj tiel kortuŝis la gardantajn soldatojn kaj policanojn, ke iuj el ili mallevis siajn armilojn en la manoj. Iu juna soldato eĉ silente proksimiĝis al Profesoro Vang, subite salutis lin per manlevo kaj diris mallaŭte:

“Ankaŭ ni estas ĉinoj . . . Tamen kontraŭ la ordono de la superuloj ni povas fari nenion. . .” Tion dirinte li forviŝis larmojn en la okuloj per sia maniko, sin turnis kaj foriris kun bedaŭro.

Ĉe Tiankiaŭ kolektiĝis sume dek mil ĝis dudek mil studentoj de diversaj lernejoj. Bone viciginte sin ili okazigis la unuan civitanan mitingon por la vastaj amasoj de urbanoj, kiuj svarmis ambaŭflanke de la strato. Poste la manifestacia kolono de studentoj kaj urbanoj komencis moviĝi en la urbon.

Sed, kiam tiu grandioza homfluo atingis Kianmen-pordegon, la fera pordego de Kianmen jam fermiĝis kaj akraj pafoj orempikaj ekkrakadis super la kapoj de la manifestaciantoj en la frosta ĉielo.

“Ne timu, ne moviĝu!” Hoŭ Ĵuj kaj Daŭging rapide ricevis ordonon de la komandejo. Ĝi fulme atingis ĉiujn gvidajn kernojn kaj ĉiujn manifestaciantojn. Kaj la kolono el dekoj da miloj da homoj senmove staris kiel giganta



monto sub la vintra subiranta suno en la pafado. Neniu moviĝis kaj neniu forkuris. Kun firme pugnigitaj manoj oni indigne rigardis la kuglojn flugantajn super la kapo. Ilian koron plenigis ne timo, sed ankoraŭ pli granda indigno . . .

Escepte de la pafado aŭdiĝis nenio alia. En tiu neordinara kvieta palpebrumo mirakle aperis antaŭ la okuloj de Daŭging mirindaĵo: Alta junulo kun sunbruna vizaĝo subite elmontriĝis sur tramveturilo staranta ekster Kianmen-pordego. Li estis neniu alia ol Giang Hua. Jam plu-rajn tagojn ŝi ricevis neniun informon pri li, kiel li, vundito, povas subite aperi en tiu loko? La koro de Daŭging forte batis de ĝojego. Ĝuste tiam, alte starante sur la tramveturilo, li kun levita kapo laŭte ekparolis al ĉiuj junaj studentoj, al miloj kaj miloj da urbanoj ne forkurantaj en la pafado, forgesante la siblantajn kuglojn:

“Karaj studentoj, ĉiuj samlandanoj kiuj ne volas sklaviĝi! . . .” Lia sonora voĉo sonis super la frosta placo de Kianmen-pordego. La manifestaciantoj, kiuj manĝis nenion dum la tago, forgesis la malsaton kaj froston, forgesis la malicajn soldatojn kaj policanojn, ekstaris sur siaj piedpintoj kaj streĉis la orelojn por aŭskulti la paroladon de tiu respondeculo de la Studenta Federacio.

“Nia manifestacio kaj mitingo celas nenion alian ol esprimo de nia vera deziro! Nun iuj diras, ke la movado por aŭtonomigo de norda Ĉinio estas deziro de la popolo, tio estas centprocenta mensogo de la japanoj kaj naciperfiduloj kaj estas trompo kaj artifiko de tiuj kiuj havas sian propran intencon! . . .”

Varma manaplaŭdado kaj huraoj plene englutis la pafadon krakantan de tempo al tempo. La vastaj amasoj de la urbanoj similaj al bolanta akvo, kies nombro estas pluroblo de tiu de la studentoj, ekkriegis kun potenca bruo de lavango:

“For la japanan imperiismon! . . .”

“For la naciperfidulojn! . . .”

Apenaŭ silentiĝis la kriado, kiam denove furioziĝis la pafado. Tiam malaperis Giang Hua de sur la tramveturilo. Maltrankvilo subite pezis



sur la koro de Daŭging. “Kiel li estas? Ĉu li estas arestita aŭ denove vundita? . . .” Sed en la intensa batalado ĉio persona fariĝis sensignifa, kaj la maltrankvilo de Daŭging pri Giang Hua baldaŭ forpasis kaj ŝi kune kun la homfluo pasie eligis la voĉon de la tuta ĉina nacio:

“For la japanan imperiismon!”


“Leviĝu la ĉinoj por savi Ĉinion!”

“Ni oponas kontraŭ la aŭtonomiga movado kiu celas dispartigi la teritorion!”

“Ni oponas kontraŭ la enlanda milito, kiu kompromitas la nacion!”

“Ĉiuj kiuj ne volas esti sklavo, leviĝu al la batalo!”

Raŭkiĝis la voĉo de Daŭging, kaj raŭkiĝis ankaŭ tiu de miloj kaj miloj da junuloj. Iliaj vizaĝoj estis makulitaj per larmoj, sango kaj



**En Pekino**


# La Somera Palaco

de GANG ZUGANG\*

**Ĉ**IRKAŬ 10 kilometrojn nord-okcidente de Pekino, apud Jukjuan-monto sin trovas vasta pitoreska imperiestra parko de klasika stilo, nome la Somera Palaco.

La totala areo de tiu parko estas pli ol 290 hektaroj. En ĝia norda parto estas Vanŝou-monto kun densaj arbaroj kaj en la suda estas Kunming-lago kun lazura akvo. Multaj konstruaĵoj kun plankareo de kelkdek mil kvadrataj metroj kaj vidindaĵoj troviĝas ĉe ili. Kiel la plej kompleta granda parko ekzistanta en nia lando, ĝi estas valora historia restaĵo.

La parko situas ĉe loko kun belaj montoj kaj klara fonto. En la 12-a jarcento, reĝo de Gin-dinastio jam konstruis tie palacon por uzo en ekskurso. Sed vera ekspluatado de tiu loko komenciĝis antaŭ pli ol 700 jaroj por solvi la problemon de bezonata akvo en la urbo. Kiam oni projektis la konstruadon de la ĉefurbo Dadu (nun Pekino) en Juan-dinastio, iu ŝtata oficisto kiu lertis en akvoutiliga konstruado, kunigis fluojn de Jukjuan-monto en lagon kaj fosis kanalon por konduki ĝian akvon en la urbon. Tio ludis gravan rolon ne nur en solvo de la problemo de akvo bezonata en la urbo, sed ankaŭ en surakva trafiko en la ĉirkaŭurbo.




**Mapo de la Somera Palaco**

1. Donggongpordego
2. Ĵenŝou-halo
3. Hiekjujan
4. Fohiang-turo
5. Longa Koridoro
6. Beigongpordego
7. Malantaŭa Lago
8. Kunming-lago
9. Bronza bovo
10. Deksep-spana Ponto
11. Okcidenta Digo

Ĉar tiu lago troviĝas apud la monteto Vengŝan, oni ĝin nomis Vengŝan-lago, kaj ĝi estis la rudimento de la hodiaŭa Kunming-lago.

En 1750, por celebri la 60-an datrevenon de la naskiĝtago de sia patrino, imperiestro Kianlong de King-dinastio, konstruigis palacon kaj kioskojn sur la monteto kaj apud la lago kaj alinomis Vengŝan

Vanŝou-monto (Vanŝou signifas longan vivon en la ĉina lingvo). Samtempe ankaŭ Vengŝan-lago estis vastigita, dragita kaj alinomita Kunming-lago. La tuta parko estis finkonstruita post 15 jaroj en 1764. Ĉar la parko havis vastan akvujojn, kiu konsistigis 3 kvaronojn de la tuta areo, oni nomis ĝin Parko de Klaraj Ondoj.



Lešoŭ-halo

En 1860, imperiisma agresa armeo invadis Pekinon, bruligis la Parkon de Klaraj Ondoĵ kaj forrabis sennombrajn trezorojn kaj dekoraciaĵojn de la parko, tiel ke ĝi ruiniĝis. En 1888, la imperiestra patrino Cihi rekonstruigis la parkon per 8 milionoj da uncoj da arĝento, monsumo por konstruado de mara armeo, malgraŭ agreso de la imperiismaj potencoj kaj danĝero de la ŝtato, kaj alinomis ĝin Jihe-parko, kiun oni kutime tradukas per Somera Palaco.

Poste, la Somera Palaco denove estis detruita de la invadantoj. Sub la regado de la reacia registaro, la konstruaĵoj estis neriparitaj dum longe, multaj antikvaĵoj estis forŝelitaj, la floraj plantoj velkis kaj la tuta parko aspektis kaduka. Nur post la liberiĝo de Pekino, la Somera Palaco ricevis plenampleksan riparadon kaj noviĝis ĝia fizionomio. Nun, ĝi akceptas ĉiujare ĉ. 5 milionojn da vizitantoj de diversaj lokoj de nia lando kaj ankaŭ amikoj de ĉiuj kontinentoj.

En projektado kaj konstruado de la Somera Palaco kiel granda imperiestra parko, oni konsideris ne nur pri bezonoj de ekskurso de imperiestroj kaj iliaj edzinoj, sed ankaŭ pri bezonoj de kortega aktivado. La tuta parko povas divi-

diĝi en tri partojn, nome tiu por politikaj aktivadoj, tiu por loĝado kaj tiu por ekskurso. Kaj la lasta parto konsistas el la fronta kaj malantaŭa partoj de Vanŝoŭ-monto kaj la distrikto de Kunming-lago.

Enirinte la frontan Donggongpordegon, oni alvenas la terenon por politikaj aktivadoj, kies centra konstruaĵo estas la majesta Ĵenŝoŭ-halo. Kiam imperiestroj kaj iliaj edzinoj de King-dinastio loĝadis somere en la parko, ili traktis kortegajn aferojn en tiu halo. Antaŭ la halo estas metitaj lerte skulptitaj bronzaĵoj kaj feniksoj kaj belaj rokoj, tiel ke la tereno por politikaj aktivadoj kaj la ekskursita tereno estu en harmonio.

Okcidente kaj norde de Ĵenŝoŭ-halo troviĝas kelkaj domoj por loĝado de imperiestroj kaj iliaj edzinoj, inter kiuj la ĉefa estas Lešoŭ-halo por loĝado de Cihi. Nordflanke ĝi sin apogas al Vanŝoŭ-monto kaj en la suda flanko ĝi frontas al Kunming-lago. Inter ĝi kaj la lago troviĝas ĉirkaŭmuro kun fenestroj en formoj de persiko, umefloro k.s. Nokte lamplumoj en la fenestroj speguliĝas en la akvo formante interesan bildon. Oriente de Lešoŭ-halo estas la korto Dehejuan, en kiu troviĝas trietaĝa sceno kun alteco de 21 metroj por pre-

zenti spektaklojn por la imperiestroj kaj iliaj edzinoj kaj korteganoj.

Irinte el la korto ĉirkaŭata de alta muro, oni alvenas al la orienta bordo de Kunming-lago. Se oni direktas sian rigardon okcidenten, tuj saltas en la okulojn vasta etendado de ĉarma pejzaĝo: Maldekstre estas longa ponto kaj insuleto sur la akvo; meze vidiĝas la svelta pagodo sur Jukjuan-monto kaj la Longa Digo en verdaj ombroj kun la Okcidenta Monto en la fono; dekstre estas ŝtona balustrado kaj longa koridoro ĉirkaŭ Vanŝoŭ-monto, laŭ kies deklivo sin trovas aro da konstruaĵoj starantaj unu super alia kun brilkolora Fohiang-turo kiel la ĉefa.

Okcidente de Lešoŭ-halo estas la Longa Koridoro. Kun Jaŭjue-pordo en ĝia orienta fino kaj Ŝiĝangkiosko en ĝia okcidenta fino, ĝi longas 728 metrojn kaj interligas, kiel kolora ĉeno, la konstruaĵojn fronte de Vanŝoŭ-monto kaj la belajn de Kunming-lago. Sur la traboj de la Longa Koridoro troviĝas pli ol 8,000 pentraĵoj en la tradicia stilo pri pejzaĝoj kaj homfiguroj, kiujn oni repentris en 1959.

La plej eleganta aro de konstruaĵoj de la Somera Palaco sur Vanŝoŭ-monto staras unu super alia en vico komencita de Pajjun-pordego en la

mezo de la Longa Koridoro kaj finita ĉe la montsupro, formante centran aksan linion de la antaŭa flanko de la monteto. Se oni iras supren laŭ la ŝtuparo, unue oni venas en Pajjun-halon, kiu estis halo por celebri naskiĝtagon de Ĉihi. Trairinte alian halon en supro, oni subite vidas ŝtonan altaron kun alteco de 20 metroj kaj ĝin ascendeinte laŭ la ŝtuparo oni venas al Fohiang-turo, kiu estas trietaĝa okangula konstruaĵo kun alteco de 41 metroj. Pro sia alta situo kaj giganteco, tiu turo videbla de multaj partoj fariĝas la centro en la bildo de la tuta palaco. En dorsa flanko de Fohiang-turo troviĝas la konstruaĵo Ĝihujhaj (Maro de Saĝo) kun glazura mursurfaco. Dank' al ĝia ekzisto ĉe la supra fino de la akso linio, elstariĝas Fohiang-turo.

La tereno post Vanŝou-monto prezentas vidajon tute diferenca de tiu antaŭ la monto. Suĝou-rivero (aŭ la Malantaŭa Lago) fluas malrapide ĉe la montpiedo. Ĝi kun surfaco jen larĝa jen mallarĝa en malsamaj partoj en ombroj de altaj arboj sur la montodeklivoj en ambaŭ bordoj kaj la kvietaj ĉirkaŭaĵoj tre plaĉas per na-

tura ĉarmo. Sur zigzaga parto de ĝia bordo antaŭe estis komerca strato dum la periodo, kiam la parko portas la nomon Parko de Klaraj Ondoj. Tiu strato estis konstruita laŭ la formo de la apudrivera komerca strato de Suĝou de Giangsu-provinco. En sia tempo, tie troviĝis tetrinkejo, drinkejo, butikoj de antikvaĵoj k. s. kun palacaj kastritaj servistoj alivestitaj en komizojn por prezenti la fizionomion de la popola vivo en urbeto de suda Ĉinio kaj amuzi tiamaniere Imperiestron Kianlong en ekskurso. Sed tiu strato estis detruita de la agresa armeo kaj nun troviĝas tie nur ĝia restaĵo. Ĉe la orienta fino de la strato troviĝas ponto alte super la fluo. Norde de la ponto estas la norda pordego de la parko kaj sude de ĝi troviĝas sur la monto aro da lamaismaj konstruaĵoj en tibeta stilo. La supre menciitaj konstruaĵoj kune formas la aksan linion post la monto. Estas bedaŭrinde, ke la ĉefaj konstruaĵoj estas forbruligitaj de la agresa armeo.

Se oni iras suden laŭ la orienta montpiedo, oni venas al malgranda parko Hiekjujuan, imitaĵo de fama parko en la urbo Vuhi en suda


Ĉinio. Ĝi estas delikata kaj eleganta formante apartan vizitindejon, kaj oni nomas ĝin "Parko en Parko". En la mezo de la parketo estas klara lageto, en kiun rapide enfluas akvo el la Malantaŭa Lago. Kaj ĉirkaŭe de la lago staras kioskoj kaj belaj domoj interligitaj per zigzaga koridoro kaj plataj pontoj. Ĉiusomere, lotusfloroj en la tuta lageto parfumas la tutan parketon per diskreta aromo kaj pro tio multaj vizitantoj estas allogataj al ĝi en tiu sezono.

Se oni iras suden de Hiekjujuan, oni venas al la tereno de Kuning-lago, trapasinte kelkajn kortojn kaj pordegon Venĉangge. Post iom da piedirado laŭ la orienta digo, oni venas al la bronza bovo kuŝanta sur la bordo. La skulptaĵo estas tre versimila kaj mem estas rigardinda artaĵo. Laŭ antikva legendo de nia lando, oni ofte jetis feran bovon en akvon por subpremi demonon de inundo, de post kiam Ju de Hia-dinastio ordigis la akvojn. Ekde Tang-dinastio (618-907 p. K.) oni ŝanĝis la kutimon kaj metis feran bovon surborde anstataŭ ĝin enakvigi. Sude de la bronza bovo estas longa ponto kondukanta al la insuleto en la lago. Ĉar ĝi havas 17 spanojn, oni nomas ĝin Deksep-spana Ponto. Sur la fostoj de la balustradoj de la ponto troviĝas 544 versimilaj ŝtonaj leonoj en diversaj pozoj.

Por pririgardi la parkon oni devas iri dekkelkajn kilometrojn kaj uzi ĉ. duonan tagon. La lakona priskribo kompreneble ne povas anstataŭi propraokulan aprecon de la belaj partoj de la parko, kaj nur persona vizito al ĝi povas ebligi al vi veran ĝuon de ili.

\* La aŭtoro estas redaktoro de la Revuo pri Arkitekturo.


Pajjun-halo





## *Sun Jatsen kaj Tong Meng Huj*

de SI GIN




*S-ro Sun Jatsen en Parizo de Francio, 1909*

**P**OST kiam la historio paŝis en la dudekan jarcenton, diversaj imperiismoj pli freneze agesis kaj prirabis Ĉinion sin apogante sur la neegala "Traktato de 1901", la vastaj laborantaj popolamasoj vivis pli mizere, kaj senprecedence akriĝis la nacia kaj klasa kontraŭdiroj. De la jaro 1901 ĝis 1905, bataloj kontraŭ impostoj kaj fremdlandaj eklezioj senĉese leviĝis en la kamparo. Kampanoj de Ĝili (nun Hebej-provinco) ribelis alte tenante la flagon kun la devizo "forbalai King-dinastion kaj forigi fremdlandajn imperiistojn". La popolo de Sanhajo kaj ĉinaj studentoj en Japanio lanĉis batalon kontraŭ la cara Rusio kiu rifuzis retiri sian armeon de nordorienta Ĉinio. Tiuj

bataloj de la popolamasoj kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo puŝis la revolucion movadon gvidatan de la burĝaj revoluciuloj kun Sun Jatsen, pioniro de la ĉina demokratia revolucio, kiel reprezentanto.

La burĝa demokratia revolucio de Ĉinio kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo ĝustadire komenciĝis de la revolucia movado gvidata de S-ro Sun Jatsen. Sun Jatsen (1866-1925) naskiĝis en kamparana familio de Cujheng-vilaĝo de Hiangŝan-gubernio de Guangdong-provinco. En sia knabeco li ŝatis aŭskulti revoluciajn rakontojn pri la Tajping-a Ĉiela Regno kaj tre admiris ĝian gvidanton Hong Hiukjuan. En sia juneco li studis en Honolulu kaj,

reveninte al la patrolando, studis medicinon en Kantono kaj Hongkong kaj sisteme akceptis la demokratian revolucion ideologion de la Okcidento. Vizaĝe al la subpremado de imperiismoj kaj la putriĝo de King-registaro, Sun Jatsen stariĝis por si la grandan celajon reformi Ĉinion. Sekve li komencis disvolvi revolucion movadon en suda Ĉinio en la nomo de medicinisto. En 1894, li skribis al Li Hongĝang, norda ministro de King-registaro, sian proponon pri reformo de aŭtokratio kaj disvolvo de kapitalismaj industrio kaj komerco por savi la nacion, sed lia opinio estis rifuzita. En la Ĉina-Japana Milito de 1894, la nacio estis en krizo kaj ĉiam pli altiĝis la revolucia entu-



*Sun Jatsen kaj Song Kingling en Japanio, 1915*

ziasmo de la popolo oponi kontraŭ imperiismoj kaj feŭdismo. Sun Jatsen ekkomprenis ke la reforma vojo estas neirebla, por savi Ĉinion oni nepre devas renversi la feŭdan regadon de King-registaro.

Vintre de 1894, Sun Jatsen fondis, kun pli ol 20 elmigrantaj ĉinoj en Honolulo, la plej fruan burĝan revolucionan asocion en Ĉinio, celante "forpeli la tatarojn, restarigi Ĉinion kaj fondi unuigintan registaron". Tuj post tio Sun Jatsen aktive preparis arman leviĝon en Kantono por faligi King-registaron. Tamen, pro malkaŝiĝo de la plano, la leviĝo ne realiĝis.

Post la malsukceso de la leviĝo en Kantono, Sun Jatsen forfuĝis kaj

migris al Japanio, Eŭropo kaj Usono. Oktobre de 1896 li estis trompote venigita al kaj arestita de ambasadorejo de King-registaro en Londono kaj oni intencis lin transporti al Ĉinio kaj mortigi. Poste li estis elsavita dank' al helpo de lia antaŭa instruisto D-ro Cantlie. De tiam Sun Jatsen daŭrigis sian lernadon de la Okcidento por trovi nacisavan vojon kaj samtempe propagandis revolucion inter ĉinaj elmigrintoj.

En la komenco de la 20-a jarcento, kiam Sun Jatsen faris revolucion agadon eksterlande, burĝaj demokratiaj revoluciuloj aperis ankaŭ inter la studentoj enlande kaj en Japanio. Ili plejparte estis patriotoj antaŭe kaj revoluciuloj poste ekscitite de la ĉiam pli serioza nacia krizo konsciante, ke Ĉinio pereos se King-dinastio ne estos faligita. Ili kaj Sun Jatsen tiam formis la burĝan revoluciularon. Ili vigle agis en diversaj lokoj de la lando kaj klopodis en Ŝanhajo kaj Tokio por eldoni ĵurnalojn, gazetojn kaj energie disvolvi revolucionajn propagandojn.

Kun vasta dissemado de la revolucionaria ideo, revolucionaj asocioj aperis unu post alia. Krom Hing Ĝong Huj, troviĝis ankaŭ Hua Hing Huj

*En 1905, Sun Jatsen fondis Tong Meng Huj de Ĉinio en Tokio de Japanio. La foto montras ĉiujn membrojn en la fondiĝa ceremonio.*





*Artilerio de la revolucia armeo ekster la urbo Vuĉang, kiam okazis la Vuĉang-a Levigo en 1911.*

starigita en 1903 en Ĉangŝa fare de Huang Hing kaj Ĉen Tianhua de Hunan-provinco, kiuj iam studis en Japanio; Guang Fu Huj starigita en 1904 en Ŝanhajo fare de Caj Juanpej kaj Ĝang Tajjan de Ĝe-giang-provinco; kaj Scienca Relerna Kurso organizita de revoluciaj junuloj de Hubej-provinco en Vuĉang, kiu poste fariĝis Literatura Asocio kaj Gong Ĝin Huj. Ĉiuj tiuj organizoj celis faligi King-dinastion per revolucio, tial ili akcelis la disvolvigon de la revolucia situacio kaj faris preparon en organizo por starigi tutlandan revolucian partion.

En 1905, kun rapida disvolvigo de la revolucia situacio, multaj revoluciuloj trovis ke estas necese starigi unuigitan organizon por gvidi la tutlandan revolucian movadon. Somere de tiu jaro, Sun Jatsen venis de Eŭropo al Japanio, kaj tie li intervendiĝis kun Huang Hing kaj aliaj kamaradoj kaj elmetis al ili sian proponon pri starigo de unuigita organizo. Ĝi tuj trovis respondojn. Meze de aŭgusto, revolucia organizo nomita "Tong Meng Huj de Ĉinio" okazigis kunvenon por sia fondiĝo, en kiu partoprenis revoluciuloj el 17 provincoj. Sun Jatsen estis elektita kiel ĝia

estro. La kunvenantoj akceptis programon de la organizo kaj decidis starigi la ĝeneralan oficejon en Tokio kaj ĝiajn filiojn en diversaj provincoj enlande kaj en aliaj lokoj eksterlande. La fondiĝo de Tong Meng Huj markis la naskiĝon de la burĝa revolucia partio de Ĉinio kaj ankaŭ antaŭsignis la alvenon de nova revolucia tajdo.

La programo de Tong Meng Huj estis "forpeli la tatarojn, restarigi Ĉinion, starigi nacian respublikon kaj egaligi terposedan rajton", kiun Sun Jatsen disvolvis en Principon de Naciismo, Principon de Demokratio kaj Principon de Popola Vivo t.e. la malnovaj Tri Popolaj Principoj. La Principo de Naciismo estis "forpeli la tatarojn kaj restarigi Ĉinion" celante renversi la manĉuran aristokratan regadon de King-dinastio, savi la nacion el la krizo kaj starigi sendependan ŝtaton; la Principo de Demokratio estis "starigi nacian respublikon", nome renversi la feŭdan imperiestran regadon kiu daŭris pli ol 2,000 jarojn en Ĉinio kaj starigi burĝan respublikon; la Principo de Popola Vivo estis "egaligi terposedan rajton" por nuligi la bienulan monopolon pri agroj kaj disvolvi kapitalismon. La programo de Tong

Meng Huj estis programo de la ĉina burĝaro por starigi burĝan respublikon kaj disvolvi kapitalismon en Ĉinio. Sed ĝi ne eksplacite esprimis oponon kontraŭ imperiismo kaj radikalajn renversojn de feŭda potenco, sekve ĝi ne estis programo de radikala nacia demokratia revolucio. Tamen ĝi estis progresa kaj revolucia, ĉar ĝi estis konforma al la volo de la popolo kaj ludis grandan rolon por alvoki la popolon kaj akceli la tiaman revolucian movadon.

Post sia fondiĝo Tong Meng Huj funkciigis sian organon "Popolan Ĵurnalon", por fari revolucian propagandon. Ĝuste en tiu tempo ĝi estis furioze atakata de lojalistoj Kang Jouvej kaj Liang Kiĉaŭ. Forfuĝinte eksterlanden pro malsukceso de la Reforma Movado de 1898 Kang kaj Liang ne konsciis de la malsukceso, ke la reforma vojo estas neirebla, kaj ankoraŭ persiste pledis por konstitucia monarkio por oponi kontraŭ perforta revolucio, intencante defendi la reaktion regadon de King-dinastio. Tiamaniere ili degeneris en kontraŭrevoluciulojn. Ili prenis la gazeton "Sinmin Ĉongbao" kiel sian ĉefan propagandilon kaj atakis la teorion kaj programon de la re-

voluciuloj. La lojalistoj estis eĉ pli danĝeraj ol King-registaro por la revoluciuloj, kaj sen frakaso de ilia atako la revolucio ne povis disvolviĝi. Sekve, de la jaro 1905 ĝis 1907 la revoluciuloj polemikis kontraŭ la lojalistoj ĉefe pri la demandoj ĉu revolucii aŭ ne, ĉu renversi King-dinastion aŭ ne. La lojalistoj ĉiamaniere beligis King-registaron, precipe imperiestron Guanhju, kaj kalumniis ke la popolo estas malica, tial demokratio ne povas esti praktikata kaj atakis ke la revolucio povas kaŭzi "ribe-lon" kaj dismembrigon al Ĉinio fare de fremdaj landoj kaj oni povas nur praktiki konstitucian monarkion, eĉ nur "racian aŭtokration". La revoluciuloj pinto-kontraŭ-pinte refutis ilin dirante, ke malica estis ne la popolo sed la registaro, kaj nur post faligo de la naciperfida registaro per revolucio, Ĉinio saviĝos kaj la popolo feliĉiĝos. Fine la revoluciuloj gajnis la batalon kaj la lojalistoj ne povis ne konfesi, ke "de pluraj jaroj pledo por revolucio" furoras en la lando. Dank' al tio la demokratia revolucia ideo pliprofundigis en la popolon kaj la revolucio disvolviĝis senĉese. Ĝuste kiel Sun Jatsen diris: "De tiam la revolucio tajde leviĝas kaj progresas kun rapideco neatendita."

Samtempe kun tio, Tong Meng Huj aktive organizis kaj mobilizis homojn al arma leviĝo por renversi King-dinastion. De 1906 ĝis 1911 ili okazigis multajn leviĝojn en la sudaj provincoj. Sun Jatsen ne nur gvidis ilin, sed ankaŭ batalis kiel soldato. La dua leviĝo en Kantono okazigita en aprilo de 1911, nome batalo ĉe Huanghuagang, estis la plej fama el ili. Ĝi estis persone decidita de Sun Jatsen. Ĝi montris la neflekseblan revolucionan spiriton de Sun Jatsen kaj multaj aliaj revoluciuloj. Por tiu leviĝo Tong Meng Huj mobilizis

ĉiujn siajn fortojn kaj faris sufiĉan preparon. Huang Hing kiel estro de la prepara organizo en Hongkong respondicis pri organizado kaj gvidado de la leviĝo kaj Sun Jatsen kolektis monon por tio eksterlande. Ili ankaŭ instalas dekojn da sekretaj organoj en Kantono kaj elektis bonegajn membrojn de Tong Meng Huj el diversaj lokoj en- kaj eksterlandaj por organizi ilin en avangardon de la leviĝo. Ili planis unue ataki Kantonon kaj poste marŝi norden laŭ pluraj vojoj. Je la kvina posttagmeze de la 27-a de aprilo, ili ekpafis en Kantono. Huang Hing batalis en la fronto kaj pli ol cent soldatoj kun blanka rubando ĉirkaŭ la brako kaj pafilo en la manoj brave sturmis sub lia gvido al la sidejo de la plej alta loka registaro kaj ekbruligis ĝin. La plej alta reganto Ĝang Fengki terurigi kaj forfuĝis transsaltinte la malantaŭan muron de la korto. Kiam la leviĝa armeo estis for-ironta, granda nombro da King-dinastiaj armeanoj venis por ĝin subpremi. La leviĝaj armeanoj sange batalis kun la malamikoj. Tamen, pro manko de helpaj trupoj, pli ol cent soldatoj de la leviĝa armeo, inkluzive de la famaj revoluciuloj kiel Lin Gjuemin kaj Fang Sengdong, martiriĝis dum akra batalo en la tuta nokto, kaj ankaŭ Huang Hing vundiĝis. Poste oni enterigis la 72 martirojn ĉe Huanghuagang. Nun oni ankoraŭ ofte iras tien por funebro.

Multaj armaj leviĝoj gvidataj de Tong Meng Huj fine malsukcesis pro tio, ke ili estis nur militaj aventuroj de malmultaj homoj sen partopreno de vastaj amasoj. Sed, la martiroj sangadis ne vane. Ilia heroa kaj sinoferema spirito por la revolucio instigis ĉiam pli multajn homojn sin ĵeti en la batalon por faligi la imperiisman lakeon King-dinastion.

## KALENDOSKOPO

### LAJJANG-PIRO

Lajjang-piro abunde produktiĝas en Lajjang-gubernio de nia Ŝandong-duoninsulo. La piro havas delikatan kaj fragilan pulpon, estas abunda je suko, aroma kaj dolĉa. Ĝi entenas ĉ. 12% da sukero, sed aliaj piroj nur 7-8% da sukero kaj relative fortan acidecon. La organika acido malmulte entenata de Lajjang-piro kombiniĝas kun etero en ĝi kaj estigis gustoplaĉan aromon. La ĉelsepto de la piro estas maldika kaj ĝiaj ŝtonecaj ĉeloj malmultaj, tiel ke la piro estas tre fragila kaj facile dispeciĝas falinte surteren de arbo alta je 2 metroj. Por manĝi ĝin oni ne bezonas multan maĉadon, ĉar ĝi havas neniun rekrementon.

La supereco de Lajjang-piro estas decidita de la naturaj kondiĉoj de la produktejo. Lajjang-gubernio ĉe la bordo de Vulong-rivero abundas je sableca grundo kun fekunda humo kaj la duoninsulo dotiĝas je milda klimato, tial la naturaj kondiĉoj tre favoras al kreskado de la pirarboj. En la pasinteco, iuj transplantis la pirarbon en aliajn lokojn, sed ne sukcesis pro tio, ke la piro perdis sian originan superecon. Post la Liberiĝo la pirarbo-kulturistoj ĉe ambaŭ bordoj de Vulong-rivero iom post iom plivastigis kulturan areon de la piroj, aplikis sciencan metodon en kulturado kaj flegado, dank' al kio la kvalito de la piro ĉiam estas bona.

La piro de Lajjang-gubernio estas ŝatata kaj bone akceptata de



la merkatoj ne nur enlanda sed ankaŭ eksterlanda. Krome, la piro estas uzata kiel bona kuracilo por bronkito kaj tusado.

## AKROBATAJO PREZENTATA DE PANDO

6-jara granda pando Vejvej, peza je 100 kilogramoj, lastatempe prezentis akrobatajn en Ŝanhajo.

Post du-jara dresado fare de la juna dresisto Lu Gingki de la Popola Akrobata Grupo de Ŝanhajo, la pando jam povas, laŭ la direktbastono, grimpi altan altanon kaj stabile kuŝi sur ĝi kun kvar kruroj supren levitaj. Kiam la dresisto jetas al ĝi 4-kilograman lignan barelon, ĝi firme kaptis ĝin kaj povas facile kaj rapide turni ĝin per la kruroj. Sur scenejo kiel bubo, Vejvej ankaŭ povas lerte fari transkapiĝojn, rajdi sur lignoĉevalo, kaj grimpi laŭ la ŝtupareton paŝon post paŝo sur la supron de la tobogano kaj poste sin glitigi malsupren. Kiam granda luphundo tiras kvarradan ĉaron en la ludejon, Vejvej



*Plukado de piroj*


ensaltas, je la mansigno de la dresisto, la sidlokon de la ĉaro, tiel ke la ĉaro portas ĝin rondkurante. En tiu tempo ĝi ektrumpetas sidante sur la ĉaro.

La granda pando estas unu el la raraj animaloj en la mondo. Iufoje, kiam dresisto venis al Siĉuan-provinco por kapti pandon. En tiea


profunda monto kovrita per densa arbaro, li trovis pandon dormantan sur trunko de alta arbo. Tio vekis al li intereson. Nun post dresado la granda pando Vejvej unuafoje prezentis sian akrobatajn por rigardantoj.


(La solvo de la enigmo en la lasta numero: ŝtuparo)

*Vejvej kuŝante rulas barelon.*



*Vejvej blovas klarionon sur ĉaro tirata de hundo.*





### ALIA ŜOSEA PONTO SUPER LA FLAVA RIVERO ESTIS FINKONSTRUITA

Lastatempe finkonstruiĝis ŝosea ponto longa je 264.6 metroj super la Flava Rivero en ĝia supra ba-

seno, en Gujde-gubernio de Kinghaj-provinco.

Ĝi estas la sesa relative granda ponto super la Flava Rivero en la provinco kaj havas gravan signifon por faciligi la trafikon de la Hajnan-a Tibetana Aŭtonoma Subprovinco de Kinghaj-provinco, ekspluati kaj utiligi riĉfontojn de la supra baseno de la Flava Rivero kaj disvolvi tieajn industrion, agrikulturon kaj brutobredadon.

En la supra baseno de la Flava Rivero loĝas tibetanoj, hujoj, salaoj, hanoj kaj aliaj naciecoj. Antaŭ la Liberigo tie troviĝis nur ligna ponto larĝa je ĉ. 1.6 metroj, kaj la ĉefa veturilo por transpasi la riveron estis flosoj faritaj el poefaga felo, kiuj perdis la vivon al multaj homoj sur la furioza torento.

### KONSTRUADO DE FIŠBREDEJOJ EN HUBEJ

En la lastaj vintro kaj printempo oni finkonstruis fiŝbredejojn kun areo de 2,000 hektaroj en Hubej-provinco, kies lagoj estas pli multaj ol tiuj de aliaj provincoj.

La nomita provinco konstruos nombron da fiŝbredejoj kun jaraj produktokvantoj de 5,000 kaj 500 tunoj en Vuhan kaj Gianghan-ebenaĵo.

De la mezo de marto, en la urbo Vuhan ĉiutage pli ol 100 buldozoj kaj kelkdek miloj da popolanoj laboras por fosi fiŝbredajn laĝetojn en la antaŭurbo. Nun, pli ol 400 hektaroj da fiŝbredejoj estis reformitaj aŭ nove konstruitaj, kie oni jam komencis bredi fiŝojn.

polvo. Daŭging denove vidis Profesoron Vang Hongbin kaj lian edzinon nemalproksime antaŭ ŝi. La okulvitroj de la maljuna profesoro jam rompiĝis, lia vasta vatita robo jam ŝiriĝis kaj sur lia polvoplana vizaĝo koaguliĝis sango. Sed li kaj lia edzino subtenis unu la alian brako en brako kaj iris majeste en la fronta vico.

“En unu flanko estas sankta laboro, dum en la alia diboĉo kaj senhonteco.” Subite eksonis tiu frazo en la kapo de Daŭging. Tiam antaŭ ŝiaj okuloj, en la tumultaj homamasoj emerĝis unu post alia la figuroj de Lu Giaĉuan, Lin Hong, franjo Liu, la “onklino”, Gaŭ Juking kaj ankaŭ la vundita Giang Hua kiu ĵus malaperis kiel kometo; post tio, oni ne scias kial, emerĝis ankaŭ la lupa vizaĝo de Hu Meng-an, la ŝvelinta flava vizaĝo de Daj Ju kaj ankaŭ la brilantaj okuletoj de Ju Jongze. La lavanga homfluo, malproksima pafado, freŝa sango kaj pasia kantado. . . , ĉio ĉi tio puŝiĝis al ŝi kiel ondoj en maro. Tiam pro malforteco kaj troa ekscitiĝo kaj laciĝo ŝi subite sentis kapturniĝon kaj pres-

kaŭ falis teren. Tamen iu studentino apud ŝi ĉirkaŭbrakis ŝin kun fortostreĉo. Kvankam ili ne konis unu la alian, tamen ili firme ĉirkaŭprenis unu la alian.

La fermita pordego de la urbomuro ne povis bari la bravajn junajn manifestaciantojn, kaj ili sturmis vicoj post vicoj al la malamikoj en la hurlanta frosta vento, kiel soldatoj konkerantaj fortikaĵojn. La pordo fine estis malfermita per puŝo de la homa maro — la malamikoj devis malfermi ĝin antaŭ la indignaj amasoj. Kaj la torenta homfluo daŭre antaŭenmarŝis.

“For la japanan imperiismon!”

“Popolamasoj, organiziĝu kaj armiĝu! La ĉinoj leviĝu por savi Ĉinion!”


La senfina homfluo, okulfrapaj flagoj kaj raŭka kaj brava kriado de sloganoj daŭre bolis super stratoj de la antikva ĉefurbo. Ankaŭ la firmaj paŝoj daŭre kaj senĉese moviĝis antaŭen kaj antaŭen plu . . .



Nova aspekto de Hining

# Hining

Fotoj de GIN HAJBAŬ



La Hining-a Parko



Hining estas la ĉefurbo de Kinghaj-provinco unu el la ĉefaj paŝtejoj de Ĉinio, kaj ĝia centro de lando kaj feloj.

La urbo havas historion de pli ol 2,000 jaroj, tamen ĝi estis dezertigita de regantoj de diversaj dinastioj antaŭ la Liberiĝo. Antikva poemo diras: "Ĉe Kinghaj-lag' skeletoj ĉie kuŝas de temp' antikva sen sepulta tuŝo." Je la Liberiĝo Hining havis nur pli ol 50,000 loĝantojn, ĝiaj stratoj estis mallarĝaj, ĝiaj domoj estis kadukaj kaj ĝia plej granda fabriko estis ledpreparo kun nur 70 laboristoj.

La Liberiĝo portis al Hining grandan ŝanĝigon. Ĉiujare granda nombro da konstruantoj tien venis de diversaj lokoj de la lando. Nun ĝi jam fariĝis nova industria urbo kun pli ol 400,000 loĝantoj; diversspecaj industriaj entreprenoj multiĝas jaron post jaro kaj ĝia kompleta kaj sendependa industria sistemo estas formiĝanta; ĝia totala produkt valoro kreskis pli-ol-500-oble kompare kun tiu antaŭ la Liberiĝo. La areo de la urbo estas plivas-



La hining-a lano

Fadenoj el la hining-a lano

tigita je 16-oblo ol tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo. Ĝiaj aferoj de scienco, eduko, medicino, komerco ktp prosperiĝas tagon post tago.

Kinghaj-provinco estas riĉa je paŝtaj produktajoj, kaj de ĝi produktitaj hining-a lano kaj ŝafaj intestoj, estas tradiciaj eksportaĵoj de nia lando al okcidenta Eŭropo kaj Japanio. Kiel grava materialo de lantekstila industrio, la hining-a lano kun karakterizaĵoj de longa fibro kaj grandaj streĉebleco kaj elasteco taŭgas por teksti diversajn altklasajn tapiŝojn, jakarde teksitajn lanajn litkovriilojn; la ŝafaj intestoj povas esti uzataj por kunkudro en operacioj kaj por fari diversajn kolbasojn. En la pasinteco imperiistoj kaj ĉinaj burokrataj kapitalistoj en komploto tiel kruele rabis la paŝtajn produktaĵojn, ke la paŝtistoj devis pagi 50 kilogramojn da lano kontraŭ 2-3 kilogramoj da ordinaraĵte-brikoj. Sed nun la riĉaj produktaĵoj montras vastan perspektivon por disvolvi prilaboran industrian de lano kaj feloj. Modernaj fabrikoj de lantekstilo kaj ledfarado jam konstruiĝis unu post alia, specoj de la produktaĵoj multiĝas jaron post jaro, ilia kvalito altiĝas senĉese, kaj la vivo de la popolo ĉiam plifeliĉiĝas dank' al la disvolvado de la produktado.





Produktado de lanaj litkovriroj



En fela prilaborejo



Diversaj ledŝuoj produktitaj de la Hining-a Leda Fabriko

Prilaboro de ŝafaj intestoj




Litkovriloj, murpentraĵoj, surtutoj k.a. el feloj de lutro, marmoto, mustelkato, vulpo kaj neĝa leopardo k.a.




# Ribelo kontraŭ la Ĉiela Palaco

(Pup teatraĵo)

Sun Vukong





1. Vukong prenis por si la titolon Ĉielegala Sanktulo por rivali kontraŭ la Ĉiela Imperiestro.




2. Laŭ la ordono de la Ĉiela Imperiestro Ora Stelo refoje venis por inviti Vukong al la Ĉiela Palaco.



3. Vukong flugas al la Ĉiela Palaco por vidi, ĉu la Ĉiela Imperiestro estas vere bonvola.



4. Ora Stelo akompanis Vukong al la Persika Ĝardeno kaj diris al li, ke li administru la ĝardenon.



5. Vukong informiĝis, ke la Diino aranĝos festenon tamen ne invitos lin, kaj li decidis kontraŭruzi.



6. Survoje al la festeno Nudpieda Feo demandas Oran Stelon, kial honori la simion per altranga titolo.







7. Vukong forte indigniĝas kaj malordigas la Diinan Palacon.



8. La Ĉiela Imperiestro kaptis Vukong per sia armeo kaj poste Vukong estis metita en la fornon de Laŭgjun por forbruligo.



9. Sed Vukong frakasis la fornon kaj fariĝis ankoraŭ pli kapabla post hardado.



10. Vukong refoje ribelas kontraŭ la Ĉiela Palaco kun siaj simioj-soldatoj.



11. Kvankam Ora Stelo estas ruzema, tamen Vukong ne estas trompebla.



12. Vukong akiris grandan venkon kaj triumfe revenas al sia monto.

PUPUJEL»RIBELOKOZ»  
TRAŮLAČIELAPALACO»



Monstro-Bovo




Āiela Generalo Li



Nudpieda Feo




Feino




Laūgjun



Giganto



Erlang



Nuoga



Ora Stelo

Farado de pupoj



8152

